



Kial Mi Ankoraŭ Restas Esperantisto

我为什么始终不渝地还要当世界语者

Prelegis Kurisu Kei 栗栖继演讲

Ĉinigis Guozhu 国柱汉译

2010 Ĉinio



Kial mi ankoraŭ restas esperantisto

我为什么始终不渝地还要当世界语者

Prelegis Kurisu Kei 栗栖繼演讲

Ĉinigis Guozhu 国柱汉译

Noto de Guozhu 国柱按:

La 92-a UK okazis je 2007-08-04/11 en Jokohamo, Japanio. En la solena inaŭguro, post la tradicia programo gratuloj far diverslandaj reprezentantoj, speciale nomite de prezidanto, aperis sur podio Kurisu Kei, 97-jara veterano en EM, li salutas tre energie al la kongresanoj kaj vekis sensacian aklamon. Tia sceno rememorigas al ni pri la simila okazo, la apero de ĉina 91-jara veterano Zhang Qicheng en la inaŭguro de 89-a UK okazinta en Pekino 2004. La varma aklamo esprimas nian koran admiron, dankon kaj respekton al tiuj veteranoj kiuj luktis dumvive por nia kara Esperanto.

Kurisu Kei estas malnova amiko de ĉina popolo. Li havas legendan vivon. Mi, Guozhu, trovis en interreto lian prelegon faritan en 2004, mi adaptis per plena ĉinigo kaj malgraŭ la origina volo aperigi ĝin pecon post peco por legado de niaj ĉina E-amikoj. Nun mi faris tion nova eLibro, omaĝe je la 100-jariĝa jubileo de la respektinda aŭtoro.

2007年8月4至11日，第92届国际世界语大会在日本横滨举行。开幕式上，在传统的各国代表致贺辞后，由大会主席特邀，97岁高龄的日本世界语者栗栖继向全体与会者致贺，他精神矍铄，受到全场的热烈欢迎。那样的场面，令人回忆起2004年在北京举行的89届UK，91岁高龄的中国老世界语者张企程在开幕式上的致辞。全场热烈的掌声和欢呼声，表达了各国世界语者是对为世界语奋斗终身的前辈们由衷的崇敬与感谢。

栗栖继(1910-07-18/2009-04-18)是中国人民的老朋友。他有着传奇般的人生。国柱从网上找到了他的一份演讲，作了全文汉译。以双语对照的形式逐一发在网上。现在将这份文稿做成电子书，献给可敬的作者百年华诞。

2010-05-01

栗栖継先生の部屋 Cxambro de KURISU Kei



栗栖継先生が去る2009年4月18日にお亡くなりになりました。98歳でした。
埼玉エスペラント会では2004年5月に先生の講演会、
10月には Jakvo SCHRAM (SAT: 国民性なき全世界協会執行部会長)さんの講演会も
先生の協力で開くことが出来ました。
時々例会や国際フェアに顔を見せていただき私たちの活動を強力に援助していただきました。
本当にありがとうございました。

田中滋

<http://members.jcom.home.ne.jp/verda/ser%20heja3.html>

Kurisu Kei

栗栖継

Kial mi ankoraŭ restas esperantisto

我为什么始终不渝地还要当世界语者

Prelego en kunveno okazigita de Esperanta Asocio
de Saitama

por Japana Jarcenta Jubileo. 2004-05-09

(2004年5月9日)

在日本埼玉 (SAITAMA) 世界语协会

为纪念世界语传入日本百周年报告会上的演讲)

Saluton, estimataj kaj karaj geaŭskultantoj (みな聴衆の皆様さん、今日は)!

Mi estas KURISU Kei ĵus prezentita. Mi estas jam
93-jara, ĉar mi naskiĝis en julio 1910, laŭ la japana erao
en julio de la 43-a jaro de Meizi. Povas esti, ke al multaj

el vi mi, oldegulo, ŝajnas esti vivanta fosilio. Sed feliĉe mi ne nur fartas sufiĉe bone, sed eĉ povas vigle agadi, verki kaj traduki, kaj ankaŭ prelegi. Mi kredas, ke mi tion dankas ne al dio, kiel multaj diruas, sed ĉefe al Esperanto. Pri la kialoj vi espereble komprenos dum mia prelego.

尊敬的、亲爱的各位听众们，大家好！

我是栗栖繼，刚才已经介绍过了。我已经93岁了，因为我生于1910年7月，按日本年号就是明治43年的七月。对于你们中的许多人而言，像我这么大岁数的人，简直就像是活化石。有幸的是，我不仅生活得够好，甚至于还能够精神饱满地写作、翻译，还能够演讲。我相信，我之所以能够如此，不是像许多人说的那样，是靠了神的保佑。我相信，主要是靠了世界语。听了我的演讲，我想你们就会明白。

Hodiaŭ mi havas grandan plezuron paroli al vi pri la temo “Kial mi ankoraŭ restas esperantisto” en la lingvo Esperanto, kiun mi ellernis en 1930 estante ankoraŭ apenaŭ 20-jara junuleto, kaj kiu multe pliriĉigis mian vivon, se ne materie do sed mense. Mi kuraĝas opinii eĉ, ke mi nun kapblas prelegi al vi estante jam 93-jara, mi dankas al Esperanto.

今天我很高兴地用世界语、向各位就《我为什么始终不渝地还要当世界语者》这样一个话题、来作演讲。我是在1930年，当我将近20岁的时候，学习世界语的。世界语极大地丰富了我的生活，但不是物质上，而是精神上的。我甚至于敢于这样想，我之所以在93岁高龄时还能够作演讲，正是多亏了世界语。

Nu, en 1997 mi publikigis en “Fonto”, monata revuo dediĉita al la esperanta literaturo, eldonata en Brazilo, kiu estas unu el kelkaj landoj, kie la Esperanto-movado

estas la plej vigla en la tuta mondo (parenteze ankaŭ nia Japanio estas unu el ili, kvankam multaj el vi certe miros, ke tiel estas en Japanio), eseon titolitan “Kial kaj kiel mi fariĝis esperantisto”. Kiel la titolo montras, en ĝi mi klarigis, kial kaj kiel mi fariĝis esperantisto, t.e. tiu, kiu scias kaj uzas Esperanton laŭ la difino en la Bulonja Deklaracio(ブローニュ宣言) pri Esperantismo(エスペラント運動), akceptita en la unua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en 1905 en Boulogne-sur-Mer, franca havenurbo frontanta la kanalon Maniko(ドーバ海峡).

1997年时，我曾经在巴西出版的世界语文学刊物《源泉》上发表过一篇文章，题目是《我为什么以及如何成为了世界语者》。巴西是全球范围内世界语运动比较发达的国家之一。（顺带说一句，我们日本也是这样的一个国家，也许你们中间有些人会对此感到惊讶。）我那篇文章的标题说的很明确：为什么、怎样成为一个世界语者。按照布伦会议宣言的定义，世界语者就是懂得并且运用世界语的人。布伦是法国的一个海滨小城，1905年在布伦召开了第一届国际世界语大会，通过了有关世界语运动的宣言。

Sed ĉar ŝajnas al mi, ke inter la hodiaŭaj geaŭskultantoj troviĝas kelkaj, kiuj ne scias, aŭ ne scias sufiĉe bone, kio estas Esperanto, mi mallonge klarigu por ili, kio ĝi estas. Nu, Esperanto estas lingvo kreita de juda okulisto nomata Zamenhof en Varsovio, la ĉefurbo de Pollando, tiam ankoraŭ sub la regado de Cara Rusio, kaj publikigita en 1887, sub titolo “Internacia Lingvo”, ruse Mejdunarodny Jazik, ĉar ĝia unua lernolibro estis eldonita ruse. Sed ĉar tiam troviĝis kelkaj aliaj lingvoj nomataj Internaciaj Lingvoj aŭ simile, por diferencigi ĝin dis de ili, ĝiaj unuaj uzantoj komencis nomi ĝin Esperanto laŭ la pseŭdonimo de ĝia kreinto D-ro

Zamenhof, per kiu li publikigis sian unuan lernolibron de tiu lingvo. De tiam kaj ĝis nun ĝi estas konata simple kiel Esperanto aŭ lingvo Esperanto.

可是，我觉得在今天的听众中，可能还有某些人并不知道世界语，或者对世界语了解得还不够充分。因此我打算首先把这一点作一个简短的介绍。世界语 Esperanto是一位名叫柴门霍夫Zamenhof的犹太籍眼科医生创造的，他住在波兰的首都华沙，那时还在沙皇俄国的统治下。1887年柴门霍夫用《国际语》（是俄文标题，因为世界语的第一本课本是用俄语发表的）发表了世界语。但那时还有一些别的国际语方案，也叫这样或者近似的名字，为了有所区别，最早的世界语者们就叫它为Esperanto，这是柴门霍夫在发表世界语时所使用的笔名。从此到今天，世界语就以此知名：Esperanto，或Esperanto语。

Zamenhof kreis Esperanton kredante, ke se ĉiuj nacioj de la mondo uzados unu komunan lingvon facile ellerneblan, ili povos bone kompreni unu la alian, tiel ke la homaro povos ĝui pacon por ĉiam. Tio estas tro simpla ideo, ĉar la historio pruvis, ke la komuneco de la lingvo sola ne povas forigi internacian miskomprenon kaj militon. Sed paradokse ĉar Zamenhof firme kredis ĝuste tion, li povis kun granda strebado finfine krei Esperanton, multe plifacile ellerneblan ol iu ajn lingvo de la mondo je granda beno por la tuta homaro..

柴门霍夫在创造世界语时，他相信：如果世界各国的人民都来使用一种易学的共同语，他们彼此就能够很好地沟通了解，人类也就可以享有永久的和平。这是一种过于简单的理想，因为历史证明了，仅靠一个共同语是不可能消除国际间的误解和战争的。然而就好像悖论似的，柴门霍夫正是出于对此的一种坚信，他

终于成功地创造出了Esperanto，比世界上的任何语言都更加容易学习，这会给全人类带来极大的好处。

La Bulonja Deklaracio jam menciita diras ankoraŭ adone: uzi por kiu ajn celo. Tio estas natura, ĉar ankaŭ Esperanto estas lingvo same kiel ĉiuj aliaj lingvoj. Tamen Esperanto havas alian kaj unikajn ecojn, kiun ĉiuj aliaj lingvoj ne havas, ĉar dum ĉi tiuj estis kreitaj de multegaj homoj dum longega tempo kvazaŭ spontane, ĝi estis kreita nur de unu homo, nome de Zamenhof, intence kaj kun antaŭe fiksita celo: krei lingvon komunan por la homaro, por ke ĉiuj nacioj bone komprenu unu la alian, tiel ke ekregu en la mondo paco por ĉiam. Ĉi tiu celo estas unika, kiu diferencigas Esperanton disde ĉiuj aliaj lingvoj.

前面提到过的布伦会议宣言，还特地补充道：可以用于任何目的。这是不言而喻的，世界语也是语言，就和其他的语言一样。然而，世界语还有一个特点，是其他语言所没有的。因为其他的这些语言，全都是许多人在很长很长的历史时期里似乎自发似地创造的，而世界语则是由柴门霍夫一个人、有意识地、带有先天明确的目的：为人类创造一种共同语，让各民族人民彼此都能够很好地沟通了解都能够，以便在世界上实现永久的和平。这个目标是独一无二的。使得世界语得以和其他这些语言得以区别开来。

Zamenhof pensis, ke la lingvo, kiun li kreis, enhavas ian ideon, kaj nomis ĝin “interna ideo de Esperanto” (エスペラントの内的理念), dum kelkaj kontraŭis kaj asertis kaj asertas eĉ nun, ke ankaŭ Esperanto estas nur lingvo kaj nenio alia, ekzemple Louis de Beaufront, kiu mem kreis novan lingvon tre similan nomatan Ido, kiu tamen nun preskaŭ ne ekzistas, dum Esperanto ne nur ekzistas sed ankaŭ praktike uzata de multaj homoj de la mondo. Kial? Mi persone opinias, ĉar i.a. Esperanto

havas en si la internan ideon, dum Ido ne. Lanti, franca esperantisto, kiu estis komunisto sed dank'al Esperanto ĉesis esti komunisto, kaj kiu en 1921 iniciatis la fondon de mondorganizo de laboristaj esperantistoj SAT (Senacieca Asocio Tutmonda), siatempe eldiris, ke Esperanto entenas econ revoluciigan.

柴门霍夫想，他所创造的语言，有一种理想，于是就称之为“世界语的内在理想”。有的人不赞成，就断言（现在还是有人这么断言）说世界语只是一个语言，而不是其他的什么东西。例如波弗朗就是这么说的。波弗朗自己也创造了一种新的语言，名叫“Ido伊多语”，与世界语极其相像。但是这伊多语现在几乎不存在了，可世界语不但存活至今，还被全世界许多的人在实际运用着。这是为什么呢？我个人认为，是因为世界语有内在的理想，而伊多语没有。还有一位法国世界语者，名叫兰提，他是一位共产主义者，可是由于世界语后来他又不再是共产主义者了。他在1921年发起成立一个全世界的工人世界语组织（SAT，全世界无民族协会），当时他也说，世界语有一种革命的性质。

Mi mem eklernis kaj ellernis Esperanton ĝuste pro tio, ke ĝi enhavas econ revolucigan kiel siatempe deklaris Lanti, kvankam mi tute ne sciis pri tio tiutempe. Estis somere en 1930, kiam mi apenaŭ 20-jara troviĝis en tuberkuloza sanatorio de Kobeo kiel senpaga paciento suferante ftizon sed kiel proleto ne havante la monon por kuraciĝi. Mi jam tre simpatiis kiel multaj tiamaj konsciencaj junuloj la komunistan movadon i.a, sub influo de la proleta literaturo, kiu laŭdire celas forigi la malriĉecon kaj realigi liberan kaj egalrajtan socion por ĉiuj popoloj.

Kun juneca ardo mi tre deziris partopreni ĝin, sed kion fari? Ĉar mi suferis ftizon rigardatan tiam kiel ne-

kuraceblan malsanon. La komunista movado tiam estis kontraŭleĝa en Japanio, kio nature postulis de ĉiu el ĝiaj partoprenantoj ne nur firman volon sed ankaŭ sanan korpon por elteni torturadon, al kiu li devos vole nevole submetiĝi, kiam li estos arestita de Tokko, la japana sekretpolico malbonfama pro granda krueleco. Kion do fari? Mi suferadis anime tage kaj nokte. Tial vi povus facile prezenti al vi, kiel mi ĝojegis kvazaŭ saltante, kiam mi trovis en la aŭgusta n-ro de “Senki” (Batalflago), laŭleĝe eldonatan monatrevuon komunisttendencan, la aperon de kies nova numero mi avide atendadis, artikolon titolitan “Proletoj kaj Esperanto”! Kia alloga titolo por mi, kiu ĉiam sentis sin proleto! Mi do ĝin tuj tralegis kvazaŭ unuspire.

我自己当初学习并且后来学会了世界语，正是因为兰提宣称世界语具有革命的性质，尽管我当时对此还一无所知。1930年的夏天，我还不到20岁，患有肺结核，可是由于无产者的地位无钱治病，就以一个免费患者的身份住在神户的结核病疗养所里。和当时的许多进步青年一样，我对共产主义运动十分同情。加之受到当时在日本也很流行的无产阶级文学作品的影响，据称共运的目标是要消除贫困而且要为全体人民实现自由和平等的社会。

带着青春的热情我非常想参加它。可是怎么办呢？我正患着被视为不治之症的肺病。那时共产主义运动在日本是非法的。也就很自然地要求它的成员，不仅要有坚强的意志，还要有健壮的体魄，以便承受一旦被特高课逮捕就会有的酷刑拷打。特高课是日本的秘密警察，以残暴而臭名昭著。怎么办呢？我日夜受着精神上的煎熬。所以你们很容易想像得出，当我从左倾但是合法出版的月刊《战旗》八月号上，读到我盼望已久的文章“无产者与世界语”时，高兴得几乎要跳了起来！这个标题对我是多么有吸引力呀！因为我一直

觉得自己就是个无产者！于是我几乎是一口气就把它读完了。

Ĝia aŭtoro Nisit Naomiti (西東なおみち), videble pseŭdonimo de iu eminenta komunista esperantisto, (efektive poste montriĝis, ke ĉi tiu estis neniu alia ol NAKAGAKI Koziro, unu el la elstaraj gvidantoj de la japana proleta Esperanto-movado), informis en ĝi, ke ekestiĝis ankaŭ en Japanio proleta Esperanto-movado, kaj ĵus fondiĝis organizo por ĝi PEA (Proleta Esperanto-Asocio) kaj ke baldaŭ aperos eĉ 6-voluma “Proleta Kurso de Esperanto” (プロレタリア?エスペラント講座). Kia ĝojo, speciale por proletoj kiel mi! Ĉar tio signifas, ke se mi ellernos Esperanton, mi povos partopreni la proletan Esperanto-movadon, kiu verŝajne estis alo de la komunista movado, eĉ se mi ne estus sufiĉe forta korpe por partopreni la kontraŭleĝan komunistan movadon.

这篇文章的作者署名为Nisit Naomiti (西東なおみち), 显然是某位杰出的共产主义世界语者的笔名(事后果然得知, 作者并非他人, 而是日本普罗世界语运动最优秀的领导人之一中垣虎儿郎。他在文中透露, 普罗世界语运动在日本也兴起了, 前不久刚成立了普罗世界语协会 (Proleta Esperanto-Asocio, PEA), 不久还要出版六卷本的《普罗世界语讲座》。这对于尤其是像我这样的无产者来说, 是多么令人高兴的消息呀! 因为这意味着, 如果我学会了世界语, 我就可以加入到普罗世界语运动的行列中来, 它很可能是共产主义运动的一翼。也就是说, 即使我的身体不够强壮, 也能够参加不合法的共产主义运动了。

Sed la “Proleta Kurso de Esperanto” bedaŭrinde ne aperis tiel frue kiel mi atendis. Mi do tuj aĉetis popularan eldonon de la memlernilo titolita “Modela

Memlernilo de Esperanto” (japane 模範 에스ペラン独習), kiu bonŝance ĝuste tiam aperis kun malkara prezo 1 eno, dum ĝia plifrua eldono kostis 2 enojn, do aĉetebla ankaŭ por mi. Kvankam mi mem nomis min proleto pro tio, ke mi laboris en malgranda ludil-fabriko en Tokio kiel simpla laboristo, ĝis mi eksuferis ftizon, mi finstudis 5-jaran mezlernejon, kie mi ellernis la anglan lingvon tiomgrade, ke mi eĉ kapablis tralegi la anglalingvan tradukon de la mondfama romano de Dostojevskij “Krimo kaj puno” kaj krom tio kvankam nur unu trimestron frekventis la 3-jaran Fremdlingvan Kolegion de Osako, kie mi ellernis la fundamenton de la franca lingvo, tiel ke ellerno de Esperanto estis por mi, sen troigo kvazaŭ ludo, laŭ japana popoldiro laboreto antaŭ matenmanĝo kaj ellernis la fundamenton de Esperanto nur en unu semajno, ankaŭ sentroige. Restis por mi nur trastudo de unu libreto kun dulingvaj tekstoj: la esperanta kaj ĝia japanlingva traduko, por ke mi povu jam tralegi libreton skribitan nur en Esperanto libreton, kvankam ankoraŭ helpate de vortaro esperanta-japana.

遗憾的是，《普罗世界语讲座》并没有像我所盼望的那样尽早出版。于是我就另外买了一本更普及的《模范世界语自修课本》。幸运的是，这普及版那时定价很便宜，只有1日元（它早先的版本定价是2日元），这样一来，我也就买得起了。尽管我因为在东京的一家小玩具厂当普工而称自己为无产者，一直到我害肺病时，我只在旧制中学里读过五年书。我学过一点英语，程度为可以读世界名著陀斯托耶夫斯基《罪与罚》的英译本。此外，我还在三年制大坂外专学过三个月，在那里学了一点法语的基础知识。这样一来，学习世界语，对我而言，不是夸口的话，就像日本俗话说的：小菜一碟而已。也不是夸口，我只用了一个星期，就学会了世界语的基础。接下来的事情，就是要读完一本世日对照的双语读物，以便我能够在世日词典的帮

助下、直接阅读全世界语的册子。

Poste mi jam povis korespondi per Esperanto kun eksterlandano, juna rusa laboristo Lembergskij, kies adreson mi trovis en la fino de tiu artikolo “Proletoj kaj Esperanto”.

后来我已经可以用世界语和外国人通信了。那是一个名叫Lembergskij的俄罗斯工人。他的地址我是从那篇《无产者与世界语》文章的末尾找到的。

Baldaŭ mi ricevis de li entuziasman respondon plenan de revolucia romantismo. En ĝi li nomis sin disĉiplo de KATAYAMA Sen, kiu reprezentis en Kominterno la Japanan Komunistan Partion. Lia letero estis la unua, kiun mi ricevis de eksterlandano. Kompreneble ĝi ege min ĝojigis. De tiam internacia korespondado per Esperanto fariĝis mia pasio, kio restas ĝis nun.

过了不多久我就收到了他的回信，充满了革命浪漫主义。他在信中称自己是日共在共产国际中的代表片山潜（KATAYAMA Sen）的弟子。这是我收到的第一封外国信件，当然令我高兴非常。从那时起，用世界语进行国际通信就成为了我最强的爱好，一直到今天。

Mi do fariĝis esperantisto, ĉar mi jam estis komunisto. Kia paradokso do estas, ke mi ĉesis esti komunisto, ĝuste dank'al Esperanto simile al Lanti, jam menciita, kvankam nur post la milito. Nu, tio okazis jene:

我于是成为了世界语者，因为我已经共产主义者了。多么奇特的事情是：也正因为世界语之助，我和前面谈到的兰提相似，后来不再是共产主义者，尽管这是战后的事情了。喏，事情是这样发展的。

Antaŭ la milito mi korespondadis ĉefe kun esperantistoj el Soveta Unio, mi do post la milito provis renovigi mian korespondadon kun ili, sed vane. Kial? Mi miregis. Nur post multaj jaroj evidentĝis, ke en la jaroj 1937 kaj 1938 Stalin arestigis ĉiujn funkciulojn kaj aktivulojn de la Esperanto-movado en sia lando, tiel ke ĝi likvidiĝis malgraŭ ke ĝi estis la plej vigla en la mondo. Kial? Sendube ĉar Stalin li timis, ke la nedezirindaj informoj pri Soveta Unio, kies diktatoro li estis, elfluos eksterlanden, kaj inverse nedezirindaj informoj enfluos en Sovetan Union pere de internacia korespondado per Esperanto. Sed kial ĝuste per Esperanto? ĉar ĝi ja estas lingvo facile ellernebla eĉ de laboristoj, kiuj finis nur elementan lernejon.

战前我主要是和苏联的世界语者通信。于是，在战后我试图重新与他们通信，可是不成。这是为什么呢？使我大为吃惊。只是许多年以后我们才得知，在1937年至1938年间，斯大林逮捕了苏联世界语运动中所有的干部和积极分子。这样一来，苏联世运就消失殆尽了，尽管以前一度是世界上最为活跃的地区。这又是为何呢？毫无疑问的是，斯大林害怕有关对苏联不利的消息传到国外，而他则是其独裁者。他同样也不愿意，由于世界语的国际通信，他所不希望听到的消息得以从国外传入苏联国内来。但为什么特别要防世界语通信呢？因为，即使是对于只有小学文化程度的工人来说，世界语是最容易学习的语言。

Ne povante korespondadi kun sovetaj esperantistoj, mi devis vole nevole korespondadi kun esperantistoj el aliaj landoj. Inter miaj alilandaj korespondantoj troviĝis hungar-devena usona esperantisto nomata Bonesper, kiu estis lia pseŭdonimo konsistanta el du esperantaj vortoj: bona kaj espero. Verŝajne li alprenis tiun esperantan pseŭdonimon kun espero, ke li povos iam reveni en sian

patrujon Hungario el Usono, kien li siatempe sekrete eniris kiel politika rifuĝinto (亡命者), ĉar estas konate, ke en Hungario okazis en 1919 komunista revolucio, kiu tamen malsukcesis, malsimile al tiu en Rusio en 1917.

不能同苏联的世界语者通信之后，无奈之下，我只好和其他国家的世界语者通信。在我的外国信友中，有一位匈牙利裔的美国世界语者，名叫“好望（Bon-esper）”，这显然是由两个世界语词根“好bona”和“希望espero”合成而来的笔名。而他之所以使用这样一个怀有希望的世界语名字，看来还是希望有朝一日能够从美国返回到祖国匈牙利去。当年他也是作为一个政治流亡者的身份秘密来到美国的。众所周知，1919年在匈牙利曾经发生过共产革命，但失败了，与1917年俄国革命的结果不同。

Plue mi legis lian nomon inter tiuj, kiuj per sia financa helpo ebligis eldonon de la libro “133 tagoj de Soveta Hungario”, aperinta ĉe EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo), esperanta eldonejo en Moskvo, kaj se mi ne eraras troviĝis en “Internaciisto”, la organo de IPE (Internacio de Proletkaj Esperantistaro), internacia organizo de komunistaj esperantistoj, kies centro troviĝis en Berlino, foto de la laborista Esperanto-grupo en Novjorko, kies gvidanto li estis. Mi do nature kredis, ke ankaŭ li estis kaj ankoraŭ restas komunista esperantisto. Mi do en unu el miaj leteroj kuraĝis konsili al li, ke li prefere reveturu en Hungarion por rekte partopreni en la socialisma rekonstruado, kiu okazas tie sub gvidado de la Hungara Komunista Partio, kiel mi naive sincere kaj serioze kredis laŭ la japana komunista gazetaro.

我还在《苏维埃匈牙利的133天》一书的出版赞助人名单中读到了他的名字。《133天》是由在莫斯科的“革

命世界语文学出版合作社”EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo) 出版的。还有，如果我没有搞错的话，我还曾经在总部设在柏林的“普罗世界语者国际”IPE (Internacio de Proletkaj Esperantistaro)的机关刊物《国际主义者》上，见到过一张纽约工人世界语小组的照片，他就是这个小组的领导人。我也就很自然地相信他也是、而且现在还是位共产世界语者。于是我在自己的一封信里大胆地建议他最好还是回匈牙利去，直接参加由匈牙利共产党领导的社会主义重建。我的这个天真、诚恳、认真的想法，是由日共的刊物中得到的。

Nu, prezentu al vi, kiel min mirigis, ba eĉ konsternis, kiam mi ricevis lian respondon, ĉar en ĝi kun indigno li riproĉis min, ke mi kuraĝis konsili al li tian absurdaĵon! Kaj li redemandis al mi: "Ĉu vi ne scias, ke nun en Hungario regas ruĝa teroro fare de la Hungara Komunista Partio, kiu estas nur la agente de la Komunista Partio de Soveta Unio, tiel ke multaj senkulpaj civitanoj tremas kun granda timo, ĉu iun meznokton ne frapus lian pardonon la komunista sekretepolico por ilin aresti. La ŝoko estis por mi tiel granda, ke mi eĉ ne kapablis al li respondi dum kelka tempo.

噢，让我说吧，他的回信让我有多么吃惊，甚至于可说是震惊。因为他在回信中愤慨地斥责我怎么会向他提出那么荒谬的建议。他反问我：“难道你不知道？如今匈牙利正处于匈共的红色恐怖统治下。匈共只不过是苏共的代理人。许多无辜的公民们，惶恐不安地、深怕有共产党的秘密警察会在半夜三更敲门来逮捕他们。”我的震惊是如此之大，以致有一段时间不能给他回信。

Sed la tono de la letero, per kiu li respondis al mi, estis tiel serioza, ke mi ne povis finfine ne rekoni, ke pravas ne mi sed li! Krom tio li bonvolis sendi al mi leteron de juna slovaka esperantisto, kun kiu li korespondadis, sciante, ke mi interesigas speciale pri ĉeĥoslovakio. Ankaŭ tiu letero estis por mi ŝoka, ĉar ĝia enhavo estis jena: Slovakio, kiu estis parto de Ĉeĥoslovakio, “sendependiĝis” la 14-an de marto 1938 kaj fariĝis Slovaka Ŝtato, sed efektive ĝi estis nur satelito de Nazia- Germanio simile al Manĉukuo (滿州国), kiu estis nenio alia ol satelito de Japana Imperio. Tamen Slovakio la unua el Ĉeĥoslovakio estis liberigita ĉefe de la soveta armeo, kvankam tiun liberigan batalon partoprenis ankaŭ la ĉeĥoslovaka armeo organizita en Soveta Unio. La amiko de Bonesper loĝis en Kosice, la ĉefa urbo de Orienta Slovakio.

可是他回信的调子是那么严肃，以致我终于不能不承认，正确的是他、而不是我。因为他得知我对捷克斯洛伐克特别感兴趣，他还给我寄了一封与他通信的年轻的斯洛伐克世界语者的信件。这封信件的内容同样使我震惊，因为信里说道：作为捷克斯洛伐克一部分的斯洛伐克，于1938年3月14日“独立”，成立了一个“斯洛伐克国”。可实际上它只不过是纳粹德国的一个卫星国，就像满州国是日本帝国的附庸一个样。然而捷克斯洛伐克的斯洛伐克这一部分，首先被苏军解放，尽管在苏联境内组成的捷克斯洛伐克部队也参加了解放捷克战斗。Bonesper（好望）的这位朋友就住在东斯洛伐克的首府Kosice市。

Iun tagon nelonge post la liberiĝo li prezentis sin en la urba placo laŭ ordono de la soveta armeo simple kredante, ke li estis mobilizita por reordigi kaj purigi ĝin, sed kia estis lia surprizo, kiam li estis devige en-
vagonigita kune kun aliaj samsortuloj kaj deportita al

karbbaseno de en Soveta Unio, kiu montriĝis bone konata Doneca Baseno, mallonge Donbass kaj tie li estis devigita labori kiel sklavo. Li tamen post nelonge decidis fuĝi kaj efektive sukcesis fuĝi el la karbminejo. Tage li sin kaŝis en arbaroj kaj nokte marŝis direkte al Slovakio orientiĝante per la steloj kaj heliantoj kaj post longa pena marŝado li sukcesis atingi Kosiĉe-on, sian hejmurbon. Feliĉe neniu ĝenis lin verŝajne pro tio, ke tiaĵoj estis tiam ĉiutagaj okazintaĵoj en Slovakio, precipe en ĝia orienta parto, kiu rekte limis kun Soveta Unio.

解放后不久的一天，他按苏军的命令到市区广场集合。起初他还以为是为了整理和打扫广场，可是后来才晓得，他以及与他遭遇相同的市民们，都被押解上火车，被送到苏联著名的煤矿区，即顿河流域的顿巴斯，他们在那里被迫像奴隶一样地劳动。可是过了不多久，他决心逃跑，并且真的成功逃离了煤矿。白天他躲藏在森林里，晚上靠天上的星星以及向日葵辨别方向、直奔斯洛伐克。就这样，经过了长途跋涉，他终于回到了老家Koŝice。所幸没有任何人为此来追查他，也可能这种事在斯洛伐克、尤其是在东部与苏联接壤的地区，多到像家常便饭吧。

Ĉi tiu okazintaĵo helpis min, ke mi liberiĝu de la iluzio, kiun mi ankoraŭ portis pri Soveta Unio, kiun mi longe kredis naive kredis, ke Soveta Unio estas la patrujo de la tutmonda socialista movado, ĉar se ĝi estas vere tia, kial ĝi devigas civitanon de la lando, kiun ĝi liberigis, sklave laborigi en ĝia karbminejo? Kaj ĉi tiu okazintaĵo ĝi poste helpis min ankaŭ por kompreni, kion signifas la liberiĝo de Ĉeĥoslovakio entute de la soveta armeo, ĉar tiu liberiĝo estis efektive nenio alia ol sklavigo, koloniigo de Ĉeĥoslovakio, kiu daŭris eĉ ĝis 1989, kiam ĝi finfine liberiĝis dank'al la demokratia revolucio, kiu okazis tie, kvankam ĝi intencis sin liberigi

de Soveta Unio jam en 1968, tamen kiel bone sciante tiun provon armite malebligis la 5 landoj de Varsovia Pakto, kiujn ĉefis Soveta Unio.

这件事帮助我从对苏联还抱有的幻想中解脱出来。长期以来，我一直相信苏联是全世界社会主义运动的祖国。但如果它真的是那样，为何要把它解放了的国家的公民捉去做苦工、在煤矿里去挖煤呢。这件事后来还帮助我从整体上来认清苏军解放捷克斯洛伐克到底是怎样的一回事。这种解放实际上只不过是將捷克斯洛伐克奴役化和殖民地化。这种状况一直持续到1989年，才终于靠民主革命得以解放。尽管早在1968年捷克就想过从苏联的控制下解放自己，然而，众所周知，被以苏联为首的华沙条约五国用军事力量镇压了下去。

Sed tio estas posta okazintaĵo kaj nun mi revenu al mia peresperanta korespondado kun Bonesper. Li bone sciis, ke mi scipovas ankaŭ angle, li do sendadis al mi de tempo al tempo eltondaĵojn de artikoloj pri Soveta Unio kaj la landoj en ĝia influfero inkluzive Ĉeĥoslovakion publikigitaj en “New York Times”. Ankaŭ tio nature helpis min multe kompreni, kiel efektive statas en tiuj landoj.

但这是后话了。现在让我们还是回到我与Bonesper（好望）的世界语通信来。他知道我也懂英语，就时不时地给我寄来一些“纽约时报”的剪报，内容是有关苏联及其势力范围（包括捷克斯洛伐克）内的消息。这也帮助我更好地了解这些国家的真实情况。

Tiamaniere mi jam bone komprenis, kiel efektive statas ankaŭ en ĉeĥoslovakio, kiam en 1959 mi estis invitita de tiea Kultur-Ministerio, por ke mi instruu kiel

lektoro la japanan lingvon en Karel-Universitato en Prago, prestiĝa samkiel Tokia Universitato en Japanio. Sed kial la ĉeĥoslovaka Kultur-Ministerio elektis por tiu tasko ĝuste min? vizitu ĝin. Sed kial la ĉeĥoslovaka Kultur-Ministerio invitis por plenumi tiun taskon ĝuste min? Jen, mallonge, kial.

就这样，当1959年捷克的文化部邀请我去布拉格Karel卡勒尔大学（这所大学在捷克就像东京大学在日本那么有名）去作日语讲师时，我对捷克斯洛伐克的真实情况已经了然于心。可是捷克的文化部为什么偏偏选中我去完成这项任务？为什么偏偏选中我去访问捷克呢？长话短说，是这样的。

Ankaŭ tio rilatas Esperanton. Post la milito mi korespondis ankaŭ kun ĉina esperantisto nomata Zhan Hongfan (張閔凡), kiu sin nomis simple Honfan. Kaj kune kun mia unua letero mi sendis al li noveleton “Ĉevalo” de komunista verkisto laborist-devena TOKUNAGA Sunao (徳永直), kiun mi prove esperantigis. Montriĝis, ke li korespondadas kun slovaka ĵurnalisto Imrich Zalupsky, kiu estante redaktoro de slovaka taggazeto “Práca (Laboro) aktive utiligis Esperanton por ĝi. Do Honfan sendis al Zálupsky mian esperantan tradukon de “Ĉevalo”, kiun li tajpkopiis. Nature ĝi estis por li plene bonvena, ĉar ĝi vivece priskribas ĉiutagan vivon de japanaj laboristoj, preskaŭ tute ne konatan en Slovakio.

这也和世界语有关。战后我也与一位中国世界语者张閔凡通信，他自称閔凡。我在第一封信里把我试着世译的一篇德永直的小说《马》寄给了他。德永直是工人出身的共产党作家。閔凡同时与斯洛伐克的一位新闻工作者Imrich Zalupsky通信。Zalupsky是斯洛伐克一家日报《劳动报》的编辑，他常将世界语的资料

用于这份报纸。阎凡把我世译由他打字的《马》转寄给了Zalupsky。我这篇译文大受他的欢迎。因为这篇小说生动地描写了日本劳动者的日常生活，而这在斯洛伐克几乎是完全陌生的。

Li do tuj slovakigis ĝin por publikigo en “Práca” kaj samtempe skribis al mi leteron laŭ la adreso, kiun li ricevis de Honfan, por peti min, ke mi sendu al li similajn noveletojn, kiujn mi esperntigos, por publikigo en “Práca” en slovaka traduko. Tio estis ĝuste kion mi tiam deziris, laŭ konata japana esprimo 渡りに船 : esperantigi japanajn literaturajn verkojn, por ke en la eksterlando oni sciu, kiel efektive vivas kaj batalas japanaj laborantaj popolanoj.

他于是马上把这篇小说翻译成为斯洛伐克语，并且发表在《劳动报》上。同时按照他从阎凡那里得到的我的地址给我写了一封信，请我继续给他寄去类似的由我世译的短篇小说，以便他译为斯洛伐克文在《劳动报》上发表。这正是我当时十分乐意的。用日本俗话说，就是“渡りに船”。把日本文学作品翻译成世界语，以便让国外的读者知道，日本劳动人民是如何生活和战斗的。

Cetere, tio estis la daŭrigo de mia antaŭmilita laboro: esperantigo de “Krabŝipo” (蟹工船), la ĉefverko de KOBAYASI TAKIZI (小林多喜二), komunista verkisto torture murdita de Tokko. Tiun laboron mi plenumis laŭ mendo de EKRELO (Eldon-Koopreativo por Revolucia Esperanto-Literaturo), la jam mencita esperanta eldonejo en Moskvo.

此外，这也是我战前工作的继续。那时我世译了被特高课残酷迫害至死的共产作家小林多喜二的最主要作品《蟹工船》。我作这项世译，是按照前面讲过的

位于莫斯科的EKRELO（革命世界语文学出版合作社）的预约而完成的。

Sed bedaŭrinde ĝi ne estis eldonita, ĉar ankaŭ EKRELO malaperis, kiam Stalin detruis deradike la esperantan movadon en Soveta Unio en inter 1937 kaj 1938. Krom tio mi mem estis arestita de Tokko la 19-an de majo 1937 kaj enprizonigita ĝis la 9-a de februaro 1939. Plue la milito ĉion malebligis.

可遗憾的是，由于斯大林在1937至1938年间把苏联的世界语运动已经斩草除根似的摧毁殆尽，EKRELO（革命世界语文学出版合作社）也在劫难逃，同样消失了。我的世译《蟹工船》也就未能出版。此外，我本人也于1937年5月19日遭到日本秘密警察特高课的逮捕并且一直关押到1939年2月9日。再以后，战争禁止了一切。

Mi do laŭ deziro de Zálupsky esp-igis pluajn japanajn noveletojn, kiuj taŭgus por publikigo en “Práca”. Ili estis: “Letero el cement-barelo” de HAYAMA Yosiki（葉山嘉樹），socialdemokrata verkisto, “Viro, kiu ne aplaŭdas” de HUZIMORI Seikiti（藤森成吉），komunista verkisto, kaj “Antaŭprintempa vento” kaj “Krizantem-floroj” de NAKANO Sigeharu（中野重治），komunista verkisto. “Ĉevalo” kaj la unuaj tri kvar el la menciitaj noveloj estis en siaj esp-aj formoj publikigitaj en “Literatura Mondo” prestiĝa revuo dedicita al la esperant-literaturo en Budapesto. Tio signifas, ke mi debutis kiel esperanta tradukisto jam komence de la 50-aj jaroj.

我于是按Zálupsky的意愿，又世译了几篇适合在《劳动报》发表的日本短篇小说。它们是：民主社会主义作家叶山嘉树的《来自水泥桶的信件》，共产主义作家藤森成吉的《不曾鼓掌的男子》，共产主义作家中

野重治的《春前之风》和《菊花》。《马》以及前述过的三四篇小说还以世界语译文的形式发表在布达佩斯出版的著名的《文学世界》刊物上。这也意味着，早在五十年代初，我就以世界语翻译家的身份登台亮相了。

Zálupsky slovakis el mia esperanta traduko ankaŭ “Krabŝipon”, kiu eldoniĝis en 1951 en Bratislavo, tiam la ĉefa urbo kaj nun ĉefurbo de Slovakio, kiu sendependiĝis en 1993. Tiel mia malfeliĉa esperanta traduko de “Krabŝipo”, kiu estas ĉefverko ne nur de Kobayasi Takizi mem sed ankaŭ de la japana proleta literaturo antaŭmilita, ba eĉ de la antaŭmilita japana literaturo entute, tiel servis almenaŭ al ĝia slovakiigo aperis en Bratislavo en 1951.

Zálupsky 从我的世界语译文将“蟹工船”也译成为斯洛伐克语，并于1951年在当时的中心城市、现在的（1993年独立）斯洛伐克的首都Bratislavo出版。这样一来，我那不幸的《蟹工船》世译稿，它至少对捷克语译本是有用的，于1951年在Bratislavo出版了。

《蟹工船》不仅是小林多喜二的代表作，同时也是日本普罗文学乃至整个战前日本文学的代表作。

Kvankam la slovaka traduko de “Krabŝipo” estis farita ne rekte el la japana originalo sed el la esperanta traduko, tamen objektivite prijuĝate ĝi estas la plej bona el ĉiuj ĝiaj tradukoj alilingvaj, ĉar mia esperanta traduko estis farita laŭ plena eldono, sen iaj ajn forstrekoj kaŭze de la cenzuro, kiu estis ege severa ĝis barbareco antaŭ- kaj dumilita Japanio, dum ĉiuj aliaj inkluzive la ĉeĥan, eĉ se ili estis faritaj rekte el la japana originalo, estis laŭ la forte cenzurita japana eldono.

尽管《蟹工船》的斯洛伐克语译本不是直接译自日语

原文，而是由世界语译本转译。然而，客观地评论一下，它却是此书所有其他外文译本中最好的，好在因为没有受到检查官的任何删节。而在战前的日本，这种检查达到了野蛮的程度。而其他所有的外文译本、包括直接译自日语原文的捷克语译本，全都是按严格检查过的日语本翻译的。

Por rekompenci min Zálupsky esperantigis el la ĉeĥa tri novelojn el “Muta barikado”, novelaro de ĉeĥa komunista verkisto Jan Drda pri diversforma rezistado fare de ordinaraĵoj ĉeĥaj civitanoj kontraŭ Nazi-Germanio, kiu okupaciis Ĉeĥion ekde la 15-a de marto 1938. El tiuj tri mi japanigis du, nome “Plianta principo”-n kaj “Gardiston de dinamitoj” kaj publikigis en monatrevo “Sin Nihon Bungaku (Nova Japana Literaturo)” kaj unu, nome “Mutan barikado”-n en monatrevo “Ningen (Homo)”. Sed ankoraŭ restis ok noveloj netradukitaj, ĉar Zálupsky estante rezerva oficiro estis mobilizita en la ĉeĥoslovakana armeon pro akriĝo de la malvarma milito.

为了报答我，Zálupsky 从捷克共产作家Jan Drda的小说集《哑垒》中世译了三部小说寄给我。这部小说集描写的是自1938年3月15日纳粹德国占领捷克后普通的捷克平民所进行的各种抵抗。我从这三篇中选译了两篇。即《更高原则》和《炸药看守人》，并且在《新日本文学》月刊上发表了。另外一篇，即《哑垒》，发表在《人》月刊上。可是还有八篇小说，没有译成世界语。因为这时冷战加剧，Zálupsky作为预备役军官被征召入伍了。

Kion fari? Post pripenso mi letere petis rekte la Ĉeĥoslovakana Kultur-Ministerion, ke ĝi bonvolu aranĝi, ke iu kompetenta esperantisto el Ĉeĥio esperantigu tiujn ok novelojn, por ke mi povu japanigi la tutan novelaron “Muta barikado” kaj eldonigi ĝin libroforme, tiel ke la

japanoj, kiuj troviĝas sub la usona okupacio, povu lerni el la spertoj de la ĉeĥoj sub nazi-germana okupacio dum la milito.

怎么办？考虑之后我直接写信向捷克斯洛伐克文化部求助，希望他们能找一位能干的捷克世界语者来把这八篇小说世译，以便我能够把《哑垒》全书翻译成日语并结集出书，以便身处美军占领下的日本人民学习战时与纳粹占领军作斗争的捷克人民的经验。

Feliĉe la Kultur-Ministerio komplezis min kaj komisiis tiun taskon al Milos Lukás, majstra Esperanto-tradukisto, tiel ke ĝi povis aperi libroforme en 1959 en mia japana traduko ĉe Seid Sya (青銅社), eldonejo tiam bone konata precipe pro la libro “Yamabiko Gakko (Lernejo, kie eĥas aŭdiĝas monta eĥo, 山びこ学校), kolekto de vivpriskribaĵoj de lernantoj de montvilaĝa mezlernejo en Orient-Norda Japanio, furorinta i.a. pro tio, ke ĝi estis filmigita.

幸好文化部对我颇为照顾。他们把这个任务交给了Milos Lukás，这是位世界语翻译大师。这样一来，我的日译本得已于1959年在青铜社出版。青铜社是当时一家知名的出版社，尤其是因为它出版了描写日本东北部一所山村中学的叙事文学作品集《山村学校》，后来此书又被拍成了电影。

En la sama jaro, nome en 1952, aperis ankaŭ en mia japana traduko unu-voluma elektita verkaro de Julius Fuĉík, ĉeĥa komunista ĵurnalisto kaj verkisto ekzekutita de la nazioj en Berlino en 1943. Ĉar tiam mi ankoraŭ ne scipovis ĉeĥe, ankaŭ la verkojn el ĝi mi japanigis el la angla kaj la rusa, kiun mi memlernis antaŭ la milito. Sed pro tio, ke en mia traduko jam aperis eĉ du libroj el la ĉeĥa literaturo, oni rigardis min kiel specialiston pri la ĉeĥa literaturo. Nature tion mi hontis kaj komencis lerni

la ĉeĥan lingvon laŭ anglalingva memlernilo de la ĉeĥa, kiun donace sendis al mi la Ĉeĥoslovaka Kultur-Ministerio. Tiamaniere mi povis ellerni la fundamenton de la ĉeĥa.

同年，即1952年，由我译成日语的捷克共产作家尤里乌斯·伏契克(Julius Fuĉík)的一卷本文集也得以出版。作者尤里乌斯·伏契克于1943年在柏林被纳粹杀害，当时我还不懂得捷克语。因我在战前自学过英语和俄语，这些作品我都是由英、俄语转译的。可是因为已经有两本我翻译的捷克文学作品出版，别人也就把我当成了捷克文学专家。当然我对此感到羞愧，于是我就用捷克文化部送给我的一本用英语讲解的捷克语自学课本开始学习捷克语。我用这种方式学完了捷克语的基础知识。

Ĝuste tiam, en 1956, la redakcio de la Geknaba Libraro de la eldonejo Iwanami petis min, ke mi japanigu por ĝi la romanon “Avinjo” de Bocena Nĕmcová, bone konata ĉeĥa verkistino el la 19-a jarcento, ĉar ankaŭ ĝi rigardis min tradukisto specialiganta pri la ĉeĥa literaturo. Cetere “Avinjo” ne estas romano verkita speciale por infanoj, sed ĉar ĝia versio, kiun Iwanami disponis, estis eldonita de la eldonejo de porinfanoj libroj en Prago, ĝi miskomprenis ĝin kiel porinfanan libron. Tamen tio ne gravas, ĉar ĝi estis facile legebla de ĉeĥaj geknaboj el la supraj jarklasoj de elementa lernejo dank'al tio, ke la ĉeĥa alfabeto estas latinlitera.

正好在1956年，岩波书局的少年文库请我为他们日译一本捷克著名女作家Bocena Nĕmcová写的小说《老奶奶》。因为他们也把我看成是翻译捷克文学的专家，再者，《老奶奶》这本书，也并非专门为儿童而写，只不过岩波书局所提供的这个版本，是布拉格一家儿童出版社出版的，他们也就误认为这是一本儿童读物。不过这也不重要，因为捷克用的是拼音文字，他

们小学高年级的学生读起来也不太困难。

Por mi, kiu ankoraŭ estis komencanto de la ĉeĥa lingvo, la romano “Avinjo” estis malfacile tradukebla, sed kia bonŝanco! Antaŭ nelonge mi donace ricevis de mia ĉeĥa korespondanto nomata Ota Ginz ĝian esperantan tradukon, tiel ke mi povis ĝin traduki helpe de tiu esperanta traduko. Mi tamen ne elektis facilan kaj ruzan manieron de tradukado: traduki laŭ la esperanta traduko kaj pretendi, ke mi ĝin tradukis rekte el la ĉeĥa originalo. Unue tion ne permesis mia konscienco kaj due mi firme decidis, ke mi funde ellernu la ĉeĥan lingvon per japanigo de “Avinjo” rekte el la ĉeĥa originalo helpate de ĝia esperanta traduko. Mi do tion faris kunpreminte dentojn.

我当时还只是捷克语的初学者，对我而言，《老奶奶》这本书是很难翻译的。可是，太幸运了！就在不久前，我从捷克通信朋友那儿得到了这本书的世界语版本，这样，我就可以借助这个世界语的译本来翻译了。但我并没有选择偷懒的办法：按世界语日译，然后大言不惭地声称是直接来自捷克原文译出的。首先是我的良心不允许，其次，我坚信，在世译的帮助下，直接从捷克原文来日译，会使我彻底学会捷克语。我咬紧牙关地这样做了。

Dank'al tio mi sukcesis ne nur japanigi “Avinjon” sed ankaŭ funde ellerni la ĉeĥan lingvon. Tiel mi povis fariĝi finfine aŭtentika vera tradukisto specialiĝanta pri la ĉeĥa literaturo. Oni diras, ke malfeliĉo ne venas sola, sed miakaze ankaŭ feliĉo ne venis sola, ĉar ĉirkaŭ majo 1959 mi ricevis de la ĉeĥoslovaka Kultur-Ministerio inviton, ke mi instruu kiel lektoro la japanan lingvon en Karel-Universitato de Prago, prestiĝa samkiel Tokia Universitato en Japanio.. Sendube tion kaŭzis ĉefe, ke ĉe Iwanami, prestiĝa eldonejo, aperies “Avinjo”, klasika

verko amata de ĉiuj ĉeĥoj, kiun mi japanigis rekte el la ĉeĥa originalo.

多亏了这样的一番努力，我不仅日译完《老奶奶》，而且也真的学会了捷克语。就这样，我终于成为一位专家级真正的捷克文学翻译家。人们通常总说祸不单行。可是我的处境则是福不单行。因为在1959年我接到了捷克的文化部的邀请，让我去布拉格Karel卡勒尔大学（这所大学在捷克就像东京大学在日本那么有名）去作日语讲师，教授日语。我想，这无疑与我能够直接从捷克原文日译了《老奶奶》并且在著名的岩波书局出版有关。《老奶奶》这本书在捷克的地位是经典名著，家喻户晓。

Nature mi nur kun granda plezuro akceptis tiun inviton, ĉar kvankam mi jam sciis, ke Ĉeĥoslovakio ne estas socialisma lando, kiel ĝi mem pretendas, sed mi prijuĝis, ke indas ne nur bone koni ĝin rekte surloke, sed ankaŭ koni surloke, kiel oni parolas la ĉeĥan lingvon, kion ili manĝas, kiel ili loĝas, entute kiel ili vivas kaj pensas, ĉar ĉio ĝi estis nepre necesa, por ke mi fariĝu kompetentulo ne nur pri la ĉeĥa literaturo sed ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio entute.

我当然很愉快地接受了这个邀请，尽管我已经知道捷克并不是它自称的那种社会主义国家。可是我认为，值得去现场好好了解。不仅可以了解真实情况，还可以在现场观察在那里人们是如何讲捷克语的，他们怎样吃饭，怎样居住，怎样生活，怎样思想。这一切，对于我不仅仅成为一个捷克文学的行家，而且成为一个全方位的捷克通，都是很有必要的。

Kaj efektive okazis, ĝuste kiel mi atendis. Kiam mi revenis en Japanion somere 1961 post preskaŭ du jara restado en Prago, mi jam estis sufiĉe kompetenta ne nur pri la ĉeĥa literaturo sed ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio entute

ĝenerale, eĉ pri la problemo de socialismo.

也真的就像我期待的那样，当我在捷克呆了两年，于1961年夏季回国的时候，我对捷克文学已经有了充分的了解，而且对捷克整个国家，甚至于对社会主义问题，也都有了深入的认识。

Mia unua laboro post reveno el Ĉeĥoslovakio estis japanigo por Tikuma Syobo ampleksan romanon mondfaman “Aventuroj de bona soldato Svejĵk”, kies japana titolo estas de Jaroslav Hasĉk kompreneble rekte el ĝia ĉeĥa originalo. Ĝi aperis tie en du volumoj, sed poste, kiam ĝi eniris la prestiĝan Iwanami-Libretaron, ĝi fariĝis kvar-voluma, ĉar tiuokaze mi aldonis ne nur aliajn rakontojn kaj eseojn de Hasĉk mem, kiuj koncernas “Ŝvejĵkon”, sed ankaŭ artikolon de Josef Lada “Kiel mi ilustris Ŝvejĵkon”.

我从捷克回国之后的第一件工作，是应筑摩书房之约日译一本大部头的世界名著、Jaroslav Hasĉk写的《好兵帅克》，它的日语名字是《士兵帅克冒险记》。当然是直接从日语原文。先是以两卷本的形式出版。但后来进入有名的岩波文库时，变成了四卷本。因为其内容不仅有小说本身，我还加了Hasĉk自己所写的许多与“帅克”有关的文章，还有Josef Lada的文章《我是怎样为好兵帅克作插图的》。

Josef Lada estas ĉeĥa pentristo, kiu estas tutmonde bone konata precipe per siaj ilustraĵoj de “Ŝvejĵk”, kiu eĉ ne estas pensebla sen liaj unikaj kaj spritaj Ilustraĵoj. La ĉeĥa eldono de “Ŝvejĵk” enhavas nur liajn 156 ilustraĵojn. Sed mi kompletigis ilin per 20 ilustraĵoj el la libro “Ilustraĵoj de Lada”, tiel ke ili fariĝis entute 176.

Josef Lada是捷克的一位画家，他之取得世界声誉，主要是由于他为好兵帅克所作的插图。如果没有他的

这些别出心裁、独具一格的插图，人们很难想像帅克是怎样一个人。捷克版的《好兵帅克》收有他的156幅插图，可是我从另外一本《Josef Lada插图集》中又选了20幅。这样一来，一共就有了176幅插图。

Tiel mi fariĝis profesia tradukisto precipe el la ĉeĥa literaturo, la unua en Japanio. Mi kredas, ke tion al mi ebligis Esperanto, ĉar se mi ne fariĝus esperantisto, mi neniam povus korespondi kun Honfan el Ĉinio kaj pere de li ankaŭ kun Zálupsk el Ĉeĥoslovakio, sekve mi neniam fariĝus tradukisto specialiĝanta pri la ĉeĥa literaturo. Oni diras, ke en la historio ne troviĝas “se”. Sed laŭ miaj spertoj mi kuraĝas aserti, ke male “se” troviĝas en la historio. Kiel mi povus fariĝi tia persono, mi, kiu antaŭmilite finis nur mezlernejon kaj lernis nur la unuan trimestron en Fremdlingva Kolegio? Mi do plene ĝuas avantaĝon, kiun prezentas Esperanto al tia mezklera japano. Tiurilate mi povas rakonti al vi ankoraŭ unu alian epizodon.

就这样，我成为了专业的翻译家，特别是从事捷克文学的翻译家，而且是日本第一人。我相信，这是世界语给了我这种可能。因为，如果我没有学习世界语，我就不会同中国的张闳凡通信。如果不与张闳凡通信、我也就不可能同捷克的Zálupsk通信，也就永远不可能成为捷克文学的翻译专家。人们总爱说：历史里面不存在“如果”。可是根据我的经验，我敢作相反的断言，即历史中存在“如果”。我怎样能够成为现在这样一种人？需知战前我只不过读到中学程度，在外语专科学校只读了一个学期。我这么一个中等文化程度的日本人，靠的完全是世界语给我的优势。这方面我还可以给你们讲另外一个故事。

Mi jam menciis, ke en 1952 aperis en mia japana traduko unuvoluma elektita verkaro de Julius Fuĉik. Ĝi nature enhavis ankaŭ lian ĉefverkon “Riporto skribita en

la pendumila maŝo”. Tiam mi ankoraŭ ne scipovis ĉeĥe, sekve mi ĝin japanigis laŭ la angla traduko aperinta en Novjorko. Sed intertempe mia memlernado de la ĉeĥa progresis tiom, ke mi jam kapablis tralegi ĝian ĉeĥan originalon. Mi do komparis la anglan tradukon kun la ĉeĥa originalo kaj trovis, ke strange, en la ĉeĥa originalo mankas linioj, kiuj priskribas, kiel agento de Gestapo, la nazi-germana sekretpolico, verŝajne ĉeĥa policano, kiu gardas lin, ĵetas antaŭ lin duonfumitan cigaredon, kaj kiel li hezitas, ĉu ĝin preni aŭ ne preni. Tiuj linioj estas miaopinie eĉ unu el la plej belaj kaj kortuŝaj lokoj el la tuta verko. Sed kial ili mankas en la ĉeĥa originalo, dum ili troviĝas en la angla traduko? Jen granda kaj grava enigmo!

我在前面曾经说过，1952年出版了我翻译的一卷本的Julius Fučík文集。其中当然也就有他最主要的那篇作品《绞索套着脖子时的报告》。我当时还不懂捷克语，我是根据纽约出的英文本转译的。后来我自学捷克语有了进步，到了能够读捷克原文的程度。于是我就把英译本与捷克原本作比较，发现了一件奇怪的事：捷克原本少了几行文字。这几行说的是，纳粹德国秘密警察盖世太保的代理人，似乎是看守他的一个捷克警察吧，扔给他半截烟头，而他为了拾不拾取这半截烟头，犹豫不决了好一会儿。按我的看法，这是全书中写得最美好、最感人的地方之一。可是，为什么捷克版本中没有，而英译本中反而会有呢？这真是一个好大的疑团！

Ĝi tamen simple solviĝis. Unu tagon dum mia restado en Prago, en 1960 mi hazarde trovis en unu el la librobrokantejoj ekzempleron de la unua ĉeĥa eldono de “Riporto” el 1945. En ĝi ja troviĝis tiuj linioj! Sed kial ili ne troviĝis en la ĉeĥa eldono “Riporto”, kiu estis la 7-a el 1948, kiun Zálupsky siatempe donace sendis al mi?

Jen nova enigmo!

这个疑团却很快就破解了。当我还在布拉格即1960年的某一天，我从一家旧书店里淘到了1945年的《报告》第一个捷克版本。那里确有这几行。可是，为什么在Zálupsky送给我的1948年捷克第7版《报告》中，这几行会消失了呢？这又是一个新的疑团！

Ĉi-foje ĝin solvis la esperanta traduko de “Riporto”. Jen kiel. En 1951 devis aperi inter multaj aliaj ankaŭ la esperanta traduko de “Riporto” fare de vetera ĉeĥa veterana esperantisto Rudolf Hromada, sed ne povis en la lasta momento malgraŭ ke ĝi estis jam prespreta, ĉar tion malebligis tiama komunista registaro. Kial? Ĉu ne estas strange, ke eldonon de la esperanta traduko de verko de komunista ĵurnalisto kaj verkisto, kiu estis eĉ ano de kontraŭleĝa Centra Komitato de Ĉeĥoslovaka Komunista Partio sub la nazi-germana okupacio, malebligis ĝuste la ĉeĥoslovaka komunista registaro?

这一次，解决这个疑团的，还是《报告》的世界语译本。事情是这样的。1951年在出版许多种文本的《报告》时，也要出版由捷克老世界语者Rudolf Hromada所翻译的世界语译本。可就在最后一分钟，连它的印刷清样都已经完成了的时候，当时的捷共政府不允许出版了。为什么呢？需知这本书的作者，是在纳粹德国占领时的非法的捷克斯洛伐克共产党中央委员会委员、共产党人记者、作家，他的书，居然正是由捷共政府来不许出版，这岂不是太奇怪了吗？

Sed tio ja okazis efektive. Jen absurdaĵo eĉ komparebla kun mondfama novelo de Franz Kafka “Metamorfozo”, en kiu ĝia hero K. iun tagon estis forkaptita de nekonataj viroj kaj mortigita kiel hundo pro kaŭzo nekonata. Ŝajnas al mi ne hazarde, ke Kafka naskiĝis en Prago samkiel Fucik . Sed ĉi-kaze la kaŭzo estis simpla kaj

klara: Ĉar la lingvo uzita por traduki “Riporton” estis Esperanto!

可是事情的确就是这个样的。这样荒谬的事情，真的可以与世界名著Franz Kafka（卡夫卡）的《变形记》相比。小说《变形记》的主角K在某一天被一群陌生人抓去，以不明的原因当成狗杀掉了。我似乎觉得这不是偶然的巧合。Kafka与 Fucik一样，都是生在布拉格。不过这一次的原因是很明确的：只因为用来翻译《报告》的语言是世界语！

Mi jam rakontis al vi, kial kaj kiel Stalin likvidis antaŭmilita la esperantan movadon de Soveta Unio. La Ĉeĥoslovaka komunista registaro simple agis laŭ tiu modelo. Jen alia pruvo, ke Ĉeĥoslovakio estis nur satelito de Soveta Unio, de kiam en 1948 ĝia komunista partio per puĉo ekprenis la politikan potencon.

此前我已经对你们讲过，斯大林在战前把苏联的世界语运动已经彻底地消灭干净了。捷共政府只不过是效仿这种做法而已。这也可以看作是另外一个证据，证明1948年靠政变夺取政权的捷共政府只不过是苏联的卫星国而已。

Sed feliĉe, Ota Ginz, alia ĉeĥa veterana esperantisto, kiu siatempe donace sendis al mi la esperantan tradukon de “Avinjo”, ankaŭ ĉi-foje prunte sendis al mi tiun esperantan tradukon de “Riporto” el Israelo, kien li intertempe transloĝiĝis estante judo. Nome dum li ankoraŭ restis en Prago li prizorgis eldonon de la esperanta traduko de “Riporto” kaj kiam ĝia eldono malebliĝis en la lasta momento, li bindigis ĝian presprovaĵojn kiel libron kaj kunportis ĝin, kiam li transloĝiĝis en Israelon.

不幸中的万幸是，捷克另外一位老世界语者Ota Ginz

(就是曾经把《老奶奶》的世界语译本赠送给我的)，这次从以色列给我寄来了这份世界语版的《报告》。Ota Ginz以犹太人的身份移民到了以色列。当他还在布拉格的时候，他负责《报告》世界语版的出版。当最后一分钟当局不让出版这本书时，他把清样装订成书，移民的时候带到以色列去了。

Nome li bone sciis, ke mi ne estis kontenta, ke mi japanigis “Raporton” laŭ la angla traduko sed ke mi intertempe ellernis la ĉeĥan kaj intencas retraduki ĝin rekte el la ĉeĥa originalo, kaj pro tio li bonvolis prunte sendi al mi ĝian esperantan tradukon por helpi min ĉe tio. Tio ne multe helpis min por elĉeĥigi “Riporton”, ĉar mi jam scipovis ĉeĥe sufiĉe bone, sed ĝi helpis min alirilate, nome por solvi la enigmon: de kiu ĉeĥa eldono oni komencis ĝin kripligi per forstrekoj kaj simile.

也就是说，他很清楚我对按英译本转译的《报告》是不满意的，他也知道我学会了捷克语，愿意从捷克语原文直接翻译《报告》。他很乐意把这份世译稿借给我，以便我有所帮助。不过这份世译稿后来对我从捷克语作世译的帮助不算太大，因为此时我已经精通了捷克语。但是它在另外一点上还是帮助了我，即让我搞清楚了，捷克版的《报告》是从第几版开始对原著进行删节之类歪曲的。

Mi jam sciis laŭ la 25-a ĉeĥa eldono, kiu aperis en 1960, ĝuste dum mia restado en Prago, kun listo de ĉiuj eldonoj ĉeĥaj kaj eksterlandaj, ke inter la 1-a unua ĉeĥa eldono el 1945 kaj la 7-a el 1948 ankoraŭ troviĝas la 2-a el 1946, la 3-a, la 4-a kaj la 5-a el 1947 kaj la 6-a el 1948. Kaj laŭ “Rememoroj pri Julius Fuĉik” de Gusta Fucikova, lia vidvino, aperinta en 1961, mi sciis, ke la 91-a folio el la manuskripto de “Riporto” portempe perdiĝis, tiel ke la unuaj du ĉeĥaj eldonoj aperis sen ĝi,

sed ĉar feliĉe printempe 1946 ĝi estis retrovita, ke ĝi estis aldonita ekde la 3-a eldono kun tiurilata piednoto de Gusta.

1960年，正当我还在布拉格的时候，因我手头拥有全部捷克版及外语版《报告》的清单，我从捷克第25版中得知，在1945年的第1版和1948年的第7版中间，还出版过1946年的第2版，1947年的第3, 4, 5版以及1948年的第6版。又据1961年发表的Julius Fuĉik的遗孀Gusta Fucikova夫人的《回忆Julius Fuĉik》一文，我得知，《报告》原稿的第91页曾经暂时丢失过，所以最早的两个捷克版本中是缺少这一页文字的。所幸这丢失的一页，于1946年春天又找回来了。这样，从第3版起都加上了Gusta为此所作的注脚。

En la esperanta traduko mankis ne nur tiu folio sed ankaŭ la epizodo pri la cigaredo, kio signifas ne nur, ke ĝi estis farita laŭ la 2-a ĉeĥa eldono sed ankaŭ ke oni komencis kripligi “Riporton” per forstreko jam ekde la 2-a eldono. Tiutempe mi ankoraŭ ne posedis la 2-an eldonon, sed poste kiam mi sukcesis akiri ankaŭ ĝian ekzempleron, tio definitive pruviĝis.

在世界语译本里，不仅缺少了这一页，也没有了那个烟头的故事。这就意味着，不仅这是按捷克第二版翻译的，也意味着，他们从第二版起就开始用删节的手段来歪曲《报告》了。当时我还没有这个第二版，可是后来当我设法搞到了它时，一切都铁证如山了。

Tamen tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la kripligo de “Riporto” komenciĝis ne ekde la 2-a eldono el 1946 sed jam ekde ĝia 1-a eldono el 1946. Tion mi povis konstati nur post la demokratia revolucio okazinta en Ĉeĥoslovakio, kiam en 1994 kaj 1995 sinsekve aperis plenaj ĉeĥaj eldonoj liberaj de ĉiuj kripligoj fare de la cenzuro. Sed tio apartenas al posta historio.

不过当时我还不知道，对《报告》的篡改并非是从1946年的第二版而是从1946年的第一版就已经开始了。这一点，我一直要等到捷克斯洛伐克发生民主革命之后才知晓。在1994至1995年的时候，先后出了许多种没有被检查官删节的足本。不过这也是后话了。

Vi jam scias, ke helpe de Esperanto, eĉ dank'al ĝi, mi povis fariĝi profesia tradukisto el la ĉeĥa literaturo. Kaj dank'al tio, ke mi fariĝis profesia tradukisto el la ĉeĥa literaturo, mi povis definitive liberiĝi de la iluzio pri socialismo laŭdire realiĝinta en Soveta Unio kaj en ĝiaj satelitaj landoj inkluzive Ĉeĥoslovakion. La kazo de la esperanta traduko de "Riporto" estas nur unu el ties multaj ekzemploj, ĉar iu ajn lando, kiu cenzure kripligas literaturan verkon, ne povas esti socialisma, ĉar tio kontraŭas demokration kaj socialismo sen demokratio neniel povas esti socialismo, ĉu ne?

你们已经知道，借助了世界语、也多亏了世界语，我成为了捷克文学翻译家。而且，也多亏我成为了捷克文学翻译家，我才得以摆脱社会主义的幻想，据说在苏联和它的卫星国包括捷克斯洛伐克是实现了社会主义的。而有关《报告》的世界语译本只不过是此类诸多事例之一。因为，任何一个国家，如果用检查官来对文学作品进行篡改，就不可能是社会主义国家，因为这种做法不民主。没有民主的社会主义无论如何也不能算是社会主义，对吗？

Mi citu alian ekzemplon. Eble kelkaj el vi scias, ke romano "Milito kontraŭ Salamandroj estas unu el la ĉefverkoj de Karel Capek, alia mondfama ĉeĥa verkisto, kiu cetere estas bone konata ankaŭ kiel kreinto de la vorto roboto. Mi japanigis ankaŭ ĝin rekte el la ĉeĥa originalo. Mi ĝin japanigis el unu el la 5-voluma elektita verkaro de Karel Capek aperinta en 1958, sed mi

konstatis, ke ne nur en ĝiaj plifruaj ĉefaj eldonoj sed ankaŭ en ĉiuj eldonoj de ĝia rusa traduko aperintaj kompreneble en Soveta Unio mankas la loko, kie troviĝas la “Proklamo de Kominternio al ĉiuj subpremitaj salamandroj de la mondo” subskribita de Molokov kaj tiu la loko, kie ankaŭ Rusio subakviĝas pro la inunda taktiko de la Salamandroj, kiuj ekmilitis kontraŭ la homaro. Kial?

让我再举另外一个例子。你们之中也许有人知道，小说《山椒鱼战争》是Karel Capek的代表作。Karel Capek是另一位世界著名的捷克作家，而且也是“机器人”这个单词的发明人。我也是从捷克原文日译了这部小说。Karel Capek有一个1958年出版的五卷本的文集，我从其中的一卷日译了这部小说。而我可以断言，在所有较早的捷克版本以及后来在苏联出版的各种俄文译本中，都少了那么一段，即由Molokov签发的“共产国际致全世界受压迫的山椒鱼宣言”，而且还缺少了因为山椒鱼发动了反人类的战争，连俄罗斯也在洪水战术中被淹没了。这是为什么？

Mi jene rezonis: La unua, la parodio de proklamoj, kiujn siatempe publikigis Kominternio al “ĉiuj subpremitaj salamandroj de la mondo” estis prenita kiel kiujn publikigis siatempe Kominternio al “ĉiuj subpremituloj de la mondo”, estis prenita kiel moko al Kominternio des pli, ke ĝin subskribas Molokov, imitaĵo de Molotov, la dekstra mano de Stalin (parenteze Molokov estas kreita el la ĉeĥa vorto mlök, kiu signifas salamadron). Tia nigra humoraĵone estis komprenebla por la tiamaj sovetaj cenzuristoj.

我是这么推理的：其一，所谓共产国际致全世界受压迫的山椒鱼宣言，是当时共产国际致全世界受压迫者宣言的戏说版；其二，更有甚者，说这个宣言是由

Molokov 签发，这是模仿由斯大林左右手 Molotov 来签发的戏说。附带说一句，Molokov 这个名字系由捷克语中的 mlök（山椒鱼）一词演化而来。这样的黑色幽默，当时苏联的检查官们当然是不可理解的。

Kaj ankaŭ la dua estis rigardita kiel sakrilegio kontraŭ Soveta Unio, kiu estas sankta por ĝiaj gvidantoj kiel la patrujo de monda socialismo. Estas do neniel permeseble, ke iu ĉeĥa verkistaĉo kuraĝu subakvigi tiun sanktan Sovetan Union, eĉ se en sciena fikcio! Kiel ili estis etanimaj kaj maltoleremaj!

上述第二点，也被认为是一种对世界社会主义祖国神圣苏联领导人的大不敬。一个捷克的恶劣作家，居然斗胆让神圣的苏联被水淹没，即使是在幻想小说中，也是绝对不能容许的！由此可见他们的气量有多么狭小，多么不能容人！

Mi jam rakontis al vi ankaŭ, ke en la komenco de la 50-aj jaroj mi debutis kiel esperanta tradukisto per publikigo de kelkaj japanaj noveletoj en mia esperanta traduko en “Literatura Mondo”, ĉar ĉi tiu estis prestiĝa esperanto- literatura revuo kaj kiam iu verko, ĉu origina ĉu traduka, estis en ĝi publikigita, ĝia aŭtoro estis rekonita kiel verkisto aŭ tradukisto . Sed bedaŭrinde mi ne povis daŭrigi tion pro kelkaj kaŭzoj, i.a. pro neceso akiri ĉiutagan panon per diligenta japanigo de literaturaj verkoj ĉeĥaj. Kaj en tio mi sukcesis kaj mi fariĝis sufiĉe bone konata kiel profesia tradukisto el la ĉeĥa literaturo.

我已经对你们讲过，早在五十年代之初，我已经以一个世界语翻译家的身份亮相了。我的几篇日本小说的世译发表在《文学世界》上。这是一个极有声望的世界语文学刊物。任何人的作品，无论是原创或者是翻译，只要能够在这一个刊物上发表，那就被看作是作

家或者翻译家（用日本话来说，就是：一登龙门，身价百倍）。可是很遗憾，出于好几个原因我不能继续下去。原因是生计问题。我必需努力日译捷克的文学作品。在这方面我成功了，也就被视为一个捷克文学的专业翻译家。

Sed tradukado ne kontentigis min des pli, ke fariĝi verkisto, precipe verkisto dulingva, esperanta kaj japanlingva, estis mia revo ekde kiam mi ankoraŭ estis tre juna, nome ĉirkau la tempo, kiam mi esperantigadis “Krabŝipon”. Mi publikigis en la februara n-ro 1935 de “Marŝu”, popolfronta esperanta revuo en Kobeo, japanligvan artikolon titolitan “Ĉirkaŭ la esperanta literaturo”, en kiu mi pledis la neceson verki dulingve, japane por la japana publiko kaj esperante por la neeksterjapana publiko, se estus nur eble. Kaj miakaze mi sentis, ke mi jam kapablas verki esperante preskaŭ samkiel japane.

可是翻译并不让我满足。成为一个作家，特别是成为一个世界语和日语的双语作家，是我多年梦寐以求的愿望，早在我很年轻的时候，也就是我世译《蟹工船》的时候，我就有这个梦想了。我在神户人民阵线的世界语刊物《前进》杂志1935年二月号上，发表过一篇题为“漫谈世界语文学”的日语文章。我在文章中认为有必要用双语写作：只要是有可能，为日本公众就用日语写作，为日本以外的公众就用世界语写作。以我本人的情况而言，我觉得自己用世界语写作已经达到用日语同样的水平了。

Dum sufiĉe longa tempo neniu el la japana Esperantujo reagis al mia problemeto, ĝis en la oktobra n-ro tiujare de “Esperanta Literturo”, revuo en Tokio, aperis japanlingva artikolo de Hasegawa Teru, kies esperanta pseŭdonimo estas Verda Majo, titolita

“Vagaĵ pensoj ĉirkaŭ la esperanta literaturo kun esperanta subtitolo “ĉu nacilingve aŭ esperante?”

在很长一段时间中，日本世界语界还没有任何人回应我提出的这个问题。一直到了同年《世界语文学》杂志的十月号上，才发表了长谷川照子（她的世界语笔名为绿川英子）的一篇日语文章“世界语文学随想”。她的这篇文章还附了一个世界语副标题：“ĉu nacilingve aŭ esperante?（是用本国语还是用世界语？）”

Ŝia opinio estis proksimume jena:: Nature multaj japanoj povas bone sin esprimi japane, sed bedaŭrinde nur malmultaj japanoj povas bone sin esprimi ankaŭ esperante. Kion fari? Mi forte rekomendas, ke la japanoj, kiuj jam povas bone sin esprimi ankaŭ esperante, prefere verku esperante por la vasta ne-japana publiko. Kaj ŝi mem bonege plenumis, kion ŝi asertis, kiel pruvas ŝia unu-voluma verkaro eldonita en Pekino en 1982 post ŝia tragika morto (pro malsukceso de abortiga operacio) en 1947 en Ĉinio ankoraŭ nur 35-jara.

她的意见大致是这样的：虽然很多日本人能够用日语较好地表达自己，可遗憾的是，只有很少的日本人能够同样好的用世界语来表达。怎么办？我强烈地推荐，已经能够用世界语写作的日本人，最好多用世界语为非日本公众写作。她自己在她主张的这一点上做得是非常好的。其证明就是她的一卷本文集，1982年在北京出版的。她本人于1947年在中国因为做流产手术失败而悲剧性地去世了，时年仅35岁。

Kaj mi? Mi ne povis simple akcepti ŝian rekomendon, ĉar en mia vidkampo ĉiam troviĝis la

japana publiko samkiel la monda publiko. Mi do elektis la vojon de dulingva verkisto. Tion mi praktikis fariĝinte unue japanlingva tradukisto el la ĉeĥa literaturo. Kompreneble mi verkis ankaŭ japane sed ĉefe artikolojn pri la literaturaj kaj politikaj okazintaĵoj en Ĉeĥoslovakio laŭmende de grandaj taggazetoj, anonime aŭ kun mia subskribo laŭ iliaj deziroj.

我的情况又如何呢？我不可能简单地接受她的倡议。因为在我的视野里，总是有着日本公众，一如国际公众那样。于是我选择了双语作家的道路。在实践中，我首先作一个捷克文学的日译者。当然我也用日语按大报的约请、写作一些有关捷克文学和时事政治方面的短文，有时用匿名，有时按编辑的愿望署上我的名字。

Sed mia verkemo nekontentigita intertempe tiom akumuliĝis en mi kvazaŭ magmo en vulkano ĉiam preta erupcii, ĝis fine mi verkis unu sufiĉe ampleksan eseon pri tio, kion mi bone sciis kaj pri kio mi deziris informi la mondan publikon, sub titolo “Kiel Esperanto helpis al mi solvi enigmon de ‘Riporto’”. Kaj en 1995 mi partoprenis per ĝi la Belartan Konkurson de UEA (Universala Esperanto-Asocio), kiu estas la centro de la tutmonda Esperanto-movado, en la branĉo Eseo. Feliĉe mi povis per ĝi ricevi la unuan premion en tiu branĉo, Premion Minnaja. Kaj tiel mi povis finfine debuti ankaŭ kiel Esperanto-verkisto estante jam 85-jara. Sufiĉe malfrue, eĉ tro malfrue, ĉu ne? Sed ŝajnas al mi, ke mi apartenas al verkistoj, kiuj maturiĝas malrapide kaj malfrue kiel malfrumatura rizo.

可是我得不到满足的写作欲望不断积累，就像火山熔岩一样，随时准备喷发。终于有一天，我写成了一篇相当长的文章“世界语是如何帮助我破解《报告》之谜的”。1995年，我参加了国际世协（它是全球世运中

心)的文艺竞赛活动中的随笔赛。而且有幸得了第一名,荣获Minnaja奖。这样,我以85岁高龄终于成为了世界语作家。真是晚,太晚了,不是吗?而我觉得自己是属于那种成熟得又慢又晚的作家之列的,就像晚熟稻一样。

De tiam mi publikigas miajn eseojn, plejparte sufiĉe ampleksajn, en prestiĝaj internaciaj Esperanto-revuoj kiel “Sennacieca Revuo” kaj “La Gazeto” en Francio “Fonto” en Brazilo. Kvankam esperantaj gazetoj kaj revuoj ĝenerale ne pagas honorarion simple pro tio, ke la nombro de la esperantistoj, sekve ankaŭ de esperantistaj legantoj, ankoraŭ estas malgranda. Sed tio ne gravas por mi, ĉar la konscio, ke miaj eseoj estas legataj tutmonde, alportas al mi nemezureble grandan plezuron, eĉ ĝuon.

从那时起我开始不断发表随笔,大多是篇幅相当长的,发表在国际知名的世界语刊物如法国的《Sennacieca Revuo》、《La Gazeto》和巴西的《Fonto》上。尽管世界语刊物通常都不付稿酬,原因是世界语者和世界语读者的数目都太少了。但我并不在意。因为得知我的文章在世界范围内被人阅读,这种感觉带给我无法估量的愉快乃至享受。

Miaj esperantaj eseoj tamen ĝis nun ne aperis libroforme. Tion tre bedaŭris mia ĉina amiko s-ro Shi Chengtai (石成泰), internacie bone konata Esperanto-verkisto, kaj proponis al mi, ke mi eldonu mian esperantan esaron proprakoste en Ĉinio, ĉar tie tio eblas nur por 100,000 (centdek mil) enoj kun eldonkvanto de 600 ekzempleroj. Mi danke akceptis tiun proponon, ĉar ŝajnis al mi, ke kvankam mi estas malriĉa kiel preĝeja muso, kiel oni diras en Eŭropo, kaj japane sukanpin, ke tiun monsumon mi povos iel disponi eltrovi. Krom tio neesperantista japana ĵurnalisto nomata s-ro H N bonvolis kontribui al

tio eĉ 20,000 (du dek mil) enojn eksciinte, ke mi eldonos mian esperantan esearon en Ĉinio proprakoste, malgraŭ ke ni ĝis nun tute ne konas unu la alian persone. Kortuŝa afero, ĉu ne?

我的许多世界语文章至今仍然未能以书籍的形式得以出版。我的中国朋友、国际知名的世界语作家石成泰先生对此大感惋惜，他于是向我建议，是否可以用自费的方式在中国出版我的世界语文集，因为按600本计算，有100,000日元就够了。我谢谢他的建议。因为，尽管我用欧洲人的话来说，穷得像教堂里的老鼠、或者是用日本人的话来说是赤贫一族，但这么一个数目我还是能够设法抠出来的。此外，有位日本非世界语者朋友、新闻工作者名叫HN的先生，一听说我要在中国出版自己的世界语文集，也愿意为此赞助20,000（两万）日元，尽管我与他至今也不曾有过一面之交。真是感人的故事，对吗？

Tiel mi jam povis sendi al s-ro Shi Chengtai 100,000 enojn, kiujn li transdonos al la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio (内蒙古世界語協會), kiu eldonos ĝin, kaj li jam verkis sian postprolon al ĝi titolitan "Li flugigas kajton". Tiun titolon li prenis el mia eseo "La kajto de Esperanto", kiun mi siatempe publikigis en "Laŭte!", dumonata internacia Esperanto-revuo en Francio. Kaj mi miaparte prenis tiun esprimon el la antaŭparolo, kiun verkis Ito Saburo (伊東三郎), esperanta poeto konata per sia pseŭdonimo I.U., kiu cetere iniciatis eldonon de "Proleta Kurso de Esperanto" jam menciita, por sia japanlingva verko "La unuaj paĝoj de Esperanto en Japanio". Vi ĉiuj certe scias pri la verko (esperantigite ankaŭ laŭsence: La unuaj paĝoj de la nederlanda lingvo en Japanio) de SUGITA Genpaku (杉田玄白). Ito Saburo titolis sian verkon laŭ titolo de tiu

libro. Tiu antaŭparolo estas nur konciza, mi do citu ĝin tutan, unue en ĝia japana originalo, kaj poste en mia esperanta traduko:

这样我就可以寄给石成泰100,000日圆，他把这笔钱转寄给内蒙古世界语协会用作出版经费，而且他还写好了题为“他放飞风筝”的后记。他之所以使用这样一个标题，源自我的一篇文章“世界语的风筝”，我的这篇文章曾经发表在法国出版的一个国际世界语双月刊《高声》上。而我之所以使用这个标题，又是受了伊东三郎一篇序言的启发。伊东三郎使用I.U.的世界语笔名，曾经发起过出版《普罗世界语教程》，他要出版自己的日语著作《日本エスペラント学事始》。这个书名我意译为《世界语在日本的最初几页》。你们大家一定知道杉田玄白的著作《兰学事始》（用世界语意译为《荷兰语在日本的最初几页》）。伊东三郎仿这本书命名了自己的著作。他的序言非常简短，我可以首先引用它的日语全文，然后再附上我的世译：

この本を澁刺たる若きエスペランティストに捧げる。

エスペラント運動は要するに凧上げだ。部屋に閉じ籠つていては駄目だ。娑婆に出て、吹きつける強い風を真向に受けてつばしらなくてはならぬ。風が強ければ強いだけいい。吹きつける風の方向を見違えぬこと、これから身を引かず、これに正確に対置すること、これが必要だ。一筋の理論による指導の糸を確固として手に握り、風に応じて糸をぐんぐんのぼしてゆくのだ。そうするとエスペラントの凧はひとりでに上がる。天まで上がる。

この糸がこの本にかくしてある。そしてこの凧上

げはエスペラント以外の世の中の諸問題にもあてはまる。」

(Ĉi tiun libron mi dediĉas al aktive agantaj junaj esperantistoj. 谨将本书献给积极有为的青年世界语者们。)

La Esperanto-movado estas, mallonge, similas al flugigadon de kajto. Por tio vi ne devas sidadi en ĉambro sed nepre eliri eksteren kaj kuregi rekte kontraŭ ventegon. Ju pli forta la vento, des pli bone. Ĉe tio necesas ne erari la direkton de la vento. Tenu firme en viaj manoj la gvid-fadenon kaj etendadu ĝin kontraŭ la vento. Tiam la kajto de Esperanto spontane leviĝos, leviĝos ĝis la ĉielo.

世界语运动，简而言之，就像是放风筝一样。为此，不应当老是坐在房间里，而一定要到外面去，迎风而奔跑。风越大越好。这时不要搞错风向，你的手要紧紧攥着风筝的线，迎风展开。这时世界语的风筝就会自动飞起，直上天空。

Ĉi tiu fadeno kasiĝas en ĉi tiu libro. La kajto-flugigo aplikiĝas ankaŭ al diversaj problemoj de la socio ne nur krom la esperantaj.)

这根线就藏在这本书里。放飞风筝也关系到各种社会问题，不单是世界语本身。

Sed mi ne rapidas eldoni mian propran esearon, ĉar pli grave ekŝajnis al mi eldoni plifrua, ĝustatempe antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto okazonta ĉi-somere en Pekino, la verkegon “7000 tagoj en Siberio” de Karlo Stajner, aŭstro-devena kroata verkisto, kiun ĉinigis s-ro Shi Chengtai laŭ ĝia esperanta traduko. Estas nepre necese aperigi ĝin ĉe komerca eldonejo, por ke ĝi

vendiĝu en librotutikoj tra tuta Ĉinio, tiel ke multaj ĉinoj povu konatiĝi kun ĉi tiu monumenta verko, en kiu la aŭtoro vive kaj objektive priskribas siajn travivaĵojn en sovetuniaj koncentrejoj sub la regado de Stalin. Sed troviĝas por tio jena obstaklo: la eldonejo, kiu pretas eldoni ĝin, postulas ke la tadukinto mem prenu sur sin la devon pagi la tutan eldonkoston, kiu egalas al 5,000 usonaj dolaroj. Kial tiom multe? ĉar unue la libro estas tre ampleksa (laŭ la esperanta traduko eĉ 494-paĝa) kaj due la eldonejo devas pagi al la registaro por akiri eldonkodon ISBN eĉ la duonon de la tuta eldonkosto, ĉi-kaze la sumon, kiu egalas al 2,500 usonaj dolaroj. Sen eldonkodo neniu libro en Ĉinio povas aperi en librotutikoj.

可是我并不忙着出版我自己的文集，因为我觉得还有一件更加重要的事，即应当在今年(2004)夏天北京的国际世界语大会召开前，要尽早出版Karlo Stajner的一本大书《西伯利亚七千天》。Karlo Stajner是奥地利裔克罗地亚作家，他的这本书是由石成泰翻译成中文的。一定要在商业性的出版社出，以便让这本书得以在全中国的书店公开销售，使得许多中国人可以读到这本里程碑式的著作。作者在这本书中客观地描写了自己在斯大林统治下苏联集中营里的生活。可是有这么个障碍，即承诺出版这本书的出版社要求译者本人负担全部的出版费用，其数额为5,000 美元。为什么要这么多的费用？一是这本书的篇幅大（按世界语译本有494面），二是出版社要向政府支付全部出版费用的一半用来购买书号（即2,500美元）。在中国，没有书号的书是不能够公开在书店销售的。

Kion do fari? Por s-ro Shi Chengtai, kiu nun estas pensiulo, estas neniel eble trovi tian grandan monsumon. Eĉ se li laborus ankoraŭ nun, tio estus tute neebla. Tion permesus al si en Ĉinio nur personoj, kiuj fariĝis riĉuloj

dank'al la sistemo de merkata ekonomio. Ankaŭ mi, japana olda kaj malriĉa pensiulo, tion neniel povus permesi al mi. Tamen feliĉe la esperanta sekcio de la Societo por Japana-Ĉina Amikeco per Korespondado (日中友好文通の会, esperanta mallongigo SJĈAK), kies fondon en 1979 mi iniciatis kaj kies prezidanto mi ĝis nun restas, havis je sia dispono ankoraŭ 136,972 enojn el 200,000 enoj, kiujn siatempe donacis al ĝi bedaŭrata NAKAHIRA Kozoo (中平孔三), ano de SJĈAK kaj antaŭmilita aktivulo de JPEU, (Japana Prolet-Esperantista Unio), la posteulo de PEA (Proleta Esperanto-Asocio) jam menciita, sekve mia iama kunbatalanto en la proleta Esperanto-movado. Ili estas sufiĉe granda monsumo. Mi do pensis: ĉu mi ne povus ĝin utiligi kiel instigilon por ebligi la eldonon de la ĉina traduko de "7000 tagoj en Siberio"? Mi do ellaboris cirkuleron tiusencan kaj dissendis al ĉiuj anoj de la esperanta sekcio. Feliĉe ĉiuj ne nur ne kontrauis sed eĉ aprobis mian ideon. Mi rondigis tiun nombron per mia propra kontribuo je 15,000 enoj. Ankaŭ s-ino M. A, kiu fariĝis mia helpantino kortuŝite de la prelego, kiun mi faris en junio lastjare en la "Maljunula Universitato", kiu havas sian sidejon en la maljunulejo, kie mi vivas, kontribuis 20,000 enojn, tiel ke la monsumo atingis ĝuste 170,000 enojn. Estu laŭdata ŝia malavara ago, kontribui eĉ 20,000 enojn malgraŭ, ke ŝi ne estas esperantistino!

怎么办呢？对于已经退休了的石成泰先生而言，是无论如何也搞不到这么一大笔资金的。即使他现在还在上班，也不可能办到。在中国，只有那些利用市场经济致富了的人才有这个经济能力。我，作为一个退休了的日本贫穷老人，也没有这个能力。所幸有一个日中友好通信协会（世界语的简称为SJĈAK）的世界语分会，是我于1979年发起创立的，直到今天还担任着它的会长。我的一位普罗世运的战友，已故的中平孔

三先生，战前曾经是普罗世界语协会PEA日本分会JPEU的积极分子，后来又是日中友好通信协会SJĈAK的成员，当年他捐助的200,000日元中，现在还有136,972日元可以动用。这是一笔大数。于是我想，能否动用这笔善款用作中文版《西伯利亚七千天》的启动资金呢？于是我就写了一个征求意见书，寄给世界语分会的全体会员。所幸无一人反对，而且都赞同我的动议。我自己也凑了15,000日元，使之成为一个整数。有位M. A女士，听我去年六月在老年大学讲学后受到感动、成为了我的助手。这老年大学位于我住的养老院里。M. A女士也赞助了20,000日元，使得总数正好达到了170,000日元。她能够慷慨解囊赞助20,000日元，真的很值得称道，因为她本人并不是世界语者！

Mi do ĝin sendis per internacia poŝtmandato al s-ro Shi Chengtai. Ĝi estis ŝanĝite en usonajn dolarojn (ĉar oni povas sendi monon en Ĉinion nur en usonaj dolaroj) estis laŭ tiama valuto) estis 1513,40 dolaroj, t.e. preskaŭ la triono de la tuto. Kuraĝigite de tio mi decidis lanĉi kampanjon Shi Chengtai kaj fondis poŝtĝirkonton Shi Chengtai unue en Japanio kaj tiucele fondis Fonduson Shi Chengtai (石成泰基金) kaj samnoman ĝirkonton por plifaciligi la monvarbadon.

我于是用国际汇票把这笔钱给石成泰寄了去。寄时兑换成了美元（因为寄钱到中国只能是美元），按当时的汇率折合成为1513,40美元，即总数的三分之一。受此行动的鼓舞，我决定发起一场石成泰运动，先是在日本建立一个石成泰邮政帐号，继而设立了一个石成泰基金及同名的帐户以便于募集捐款。

Ĝis nun per tiu poŝtĝirkonto aŭ kontante kelkaj el la malvasta sfero de miaj konatoj kontribuis siajn obolojn,

tiel ke la tuta sumo tiel kolektita jam atingis eĉ iom pli ol 150,000 enojn. Inter tiuj kontribuintoj troviĝas ankaŭ s-ro Y H, kiu kontribuis eĉ 20,000 enojn el sia salajro. Li sidas nun inter vi, bonvolu do aplaŭdi lin.

直到现在，从我不大的熟人圈子中有些人把自己的钱拿来捐助，使得总数超过了150,000 日元。这些赞助者中，有位 Y H 先生，甚至从自己的工薪里赞助了20,000 日元。他现在就坐在我们会场，请为他鼓掌。

S-ro S .T , kiu estas ano de la esperanta sekcio de SJĈAK, kontante sendis al mi eĉ 20,040 enojn el sia ĵus ricevita pensio. Kial tiaj nerondaj ciferoj? Ĉar kiel li skribas en sia letero, li volis kontribui la dekoblom de 2004, la jaro, kiam en Pekino okazas la Universala Esperanto-Kongreso, nome ĉi tiu jaro. Ankaŭ kortuŝa afero, ĉu ne? ĝuste hieraŭ mi ricevis de s-ro Shi Chengtai leteron, en kiu li skribas, ke ankaŭ li estis kortuŝita de tiu konduto de s-ro Suzuki Takao. Mi nome informas lin pri ĉiu kontribuinto. Mi estas certa, ke li estos kortuŝita ankaŭ de tio, ke s-ro YAZIMA Hirosi tiel kontribuis sian obolon, ĉar mi hieraŭ per interreto informis lin ankaŭ, kiel tio okazis. Eble ankaŭ vi interesiĝas, kiel tio okazis. Mi do mallonge rakontu, kiel.

S. T先生是日中友好通信协会世界语分会的会员，他从自己刚领到的退休金中捐给我20,040日元。怎么是这么一个带零头的数目呢？正如他在给我的信中所说，他是想捐2004这个数字的十倍，因为在2004这一年，要在北京召开国际世界语大会。这也是一件感人的故事，是吗？就在昨天我收到了石成泰的来信，他说也是很受Suzuki Takao先生善举的感动。我就向他介绍了所有的赞助人。我相信，他也一定会为YAZIMA Hirosi先生赞助零钱的这种方式而感动。因为我昨天已经用互联网告诉了他这件事的经过。也许你们也愿

意知道这件事是如何发生的。那么我就简短地讲一讲吧。

En januaro ĉi-jare mi ĉeestis akompanate de s-ino M ĵus menciita la ĉiumonatan regulan kunsidon de la Esperanto-Societo de Saitama, kaj min prezentis en Esperanto. Ĝin tiam interpretis japanen s-ro S, profesoro de la Universitato de Saitama. Tiam ĝuste fronte de mi sidis junulo, kiu ankaŭ en Esperanto diris aldone ion, kion interpretis japanan same s-ro Sasaki, kiu sidis dekstre de mi, ĉar mi duonsurda ne povis bone aŭdi. Mi do komprenis, ke li diris, ke lin forte impresis, eĉ kortuŝis tio, ke mi malgraŭ ke mi estas jam 93-jara oldegulo ankoraŭ tiel vigle agadas, multe pli vigle ol lia avino, kiu estas ankoraŭ 84-jara aŭ simile (ĉar mi ne memoras precize). Poste mi informiĝis de s-ro T. S, la animo de la Esperanto-Societo de Saitama, ke tiu junulo kortuŝite de tio, ke mi jam tiel oldega ankoraŭ vigle agadas por Esperanto, senprokraste aliĝis la Japanan Esperanto-Instituton, la centron de la japana Esperantomovado. Ĉi tio siaparte min kortuŝis, sed mi ne memoris lian nomon pro mia duonsurdeco, nek s-ro Tanaka nomis lin.

今年元月，我在M女士的陪伴下参加了埼玉世界语协会每月一次的例会，并且用世界语作了自我介绍，由埼玉大学的教授S先生翻译成日语。当时有一位年轻人，正好坐在我对面。他也用世界语作了一点儿补充，由坐在我右边的Sasaki同样口译为日语。因为我有半点失聪、听不清楚。这样我就明白了，他说是见到我93岁老人还能如此活跃，印象很深、甚至很是感动，因为比他84岁奶奶（或是这个岁数左右的老人，因我听不清楚）活跃多了。事后我又从埼玉世界语协会的核心人物TS先生处得知，这个年轻人，见我这么一大把年纪了还在为世界语热心奔走，他马上就加入了日本世运的中心组织日本世界语学会，反过来这又使

我很受感动，可是由于我听力不行，没记住他的名字，Tanaka先生也没有说到他的名字。

Sed ĉar en la folieto de la poŝtĝirkonto, per kiu li sendis tiun monsumon por Fonduso Shi Chengtai, troviĝis lia adreso en urbo O., mi supozis, ke ankaŭ tiu s-ro Y. apartenas al la Esperanto-Societo de Saitama, ĉar kvankam mi ne longe loĝas en la gubernio Saitama kaj ankoraŭ ne orientiĝas bone pri ĝiaj urboj, ŝajnis al mi, ke ankaŭ tiu urbo apartenas al la gubernio Saitama. Mi do demandis s-ron T pri tio per interreto kaj tiel mi unuafoje eksciis, ke tiu s-ro Y estas neniu alia ol tiu junulo, kiu sidis rekte antaŭ mi. Ĉi tio min ege kortuŝis. Nature, ĉar kvankam alveno de ĉiu kontribuo al la Fonduso Shi Chengtai min ĝojigis kaj feliĉigis, lia kontribuo alvenis ĝuste en la momento, kiam la fluo de monkontribuado portempe ekstagnis.

可是，因为在他给石成泰基金寄钱的汇款单上，留下了他在O城的地址，我猜想这位Y先生也应该是埼玉世界语协会的成员。又因为，虽然我在埼玉县住了很长时间也还没有弄清所辖的城市，但我还是觉得这个城市也是在埼玉县的范围内。于是我用电邮向T先生打听，并头一回听说这位Y先生不是别人，而正是坐在我正对面的那位年轻人。这件事令我大为感动。尽管说每一笔给石成泰基金的捐款都会让我感到高兴和幸福，但他的这笔捐款来得正是资金周转不太灵活的时候。

Kial mi sentas min tiel ĝojas kaj feliĉa ĉiufoje, kiam mi ricevas kontribuon al la Fonduso Shi Chengtai? Vi eble miras, ĉar ĝi estas fonduso por fremdulo, sed ne por mi persone. Nu, mi mem ne scias precize kial. Sed efektive tiel okazas. Eble tiun feliĉan naturon mi akiris dum mia longa vivo, mem ne sciante precize de kiam. 我为什么每当接到给石成泰基金捐款的时候就感到

高兴和幸福呢？你们也许会觉得惊讶，因为这个基金会是为了帮助别人而不是为了我自己。噢，我本人也说不明白，可的确就是这样。也许我的这种幸福感来自于我长长的一生，自己都不能准确地知道从什么时候开始。

Tiel mi jam nun estas preskaŭ certa, ke mia celo finance helpi kaj ebligi la eldonon de la ĉina traduko de “7000 tagoj” ĝustatempe antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino estos atingita, des pli, ke mi aranĝis, ke s-ro Shi Chengtai portempe prunteprenu 100,000 enojn, kiujn mi sendis al li plifruie por proprakosta eldono de mia esearo en Ĉinio, se necese. Kiam efektive aperos lia ĉina traduko de “7000 tagoj en Siberio” ĝustatempe antaŭ la UK de Esperanto en Pekino, kiel ĝojegos s-ro Shi Chengtai! Tiam ankaŭ mi ĝojegos, ĉar lia ĝojego estas ankaŭ mia ĝojego. Kiel vi bone scias, ke en Japanio troviĝas popoldiro “Bonfaro revenas al bonfarinto mem”. Ŝajnas al mi, ke mia kazo kongruas ĝuste kun tiu popoldiro.

这样一来，我现在就可以几乎肯定，我想在经济上帮助让《七千天》使之能赶在北京国际世界语大会之前出版的目标，一定能够达到。再者，我还作了这样的安排，即在必要的情况下，他可以借用我此前为了在中国出版我的个人文集而早寄给他的那100,000日元。当石成泰翻译成中文的《西伯利亚七千天》一书真的能够赶在北京国际世界语大会之前出版时，石成泰先生该有多么高兴呀！那时我也会非常高兴，因为他的非常高兴也就是我的非常高兴呀！你们都知道日本有这样的一句俗语：“好人自有好报”。我觉得在我的这件事情上，正好合了这句俗语。

Mi ĵus diris, ke “mi jam nun estas preskaŭ certa, ke mia celo finance helpi kaj ebligi la eldonon de la ĉina

traduko de “7000 tagoj en Siberio” ĝustatempe antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino estos atingita...” Mi aldonis al la adjektivo “certa” la adverbajn partiklon ”preskaŭ”, ĉar en la mondo nemalofte okazas, ke, io pri kio oni estas certa, ke ĝi nepre plenumiĝos, ne povas plenumiĝi en la lasta momento pro ia obstaklo, kiu aperas neatendite.

我刚才说了：“我现在就可以几乎肯定，我想在经济上帮助让《七千天》使之能赶在北京国际世界语大会之前出版的目标，一定能够达到。”我在形容词“肯定”的前面加了一个副词“几乎”。因为在世上也常有这样的情况：人们以为肯定会完成的事情，由于某种意外出现的障碍，在最后的一刻没有能够完成。

Bedaŭrinde tio aplikiĝas ankaŭ ĉi-kaze, ĉar montriĝis, ke la eldonejo, kiu estis preta eldoni la ĉinan tradukon de “7000 tagoj en Siberio”, ekhezitas tion fari pro tio, ke ĝi timas, ke ĝi suferos ian tio kaŭzusan malagrablaĵon pro intervenode la ĉina registaro.

遗憾的是，在这件事情上也是如此。因为有情况表明，原本打算出版这本中文版《西伯利亚七千天》的出版社，突然犹豫起来，因为它担心会由于中国政府的干涉而招来麻烦。

S-ro Shi Chengtai informis min lastatempe per sia retroŝta letero, ke en Ĉinio povis eldoniĝi eĉ “Akipelago Gulag” de Solĵenicyn, kiu laŭenhave estas pli drasta ol “7000 tagoj en Siberio”, kvankam ambaŭ priskribas la vivon en koncentrejoj en Sovet Unio. Kial? Mi devis pripensadi.

石成泰先生最近用电邮告诉我，说是在中国连 Solĵenicyn 的《古拉格群岛》一书也可以出版了，其

内容，比《西伯利亚七千天》有过之。尽管这两本书都是描写苏联集中营生活的。为什么？我应当好好想想。

Hazarde aŭ konsekvence mi tralegis tiam en la maja n-ro de “Tosyo”(Libro), monatrevo, kiun eldonas jam supre menciita eldonejo Iwanami propagandocele, artikolon de japana verkisto s-ro KOBAYASI Kyuzi titolitan “Bunte pri Ĉinio”, en kiu li skribas, ke en Ĉinio, kiun li vizitis antaŭ du jaroj ĉefaronte televidan teamon, furoras koruptado kvazaŭ malsano nekuracebla, tiel ke tie oni povas plenumi nenion, nenio estas plenumebla ne koruptante koncernajn funkciulojn, ĉu de la registaro, ĉu de la komunista partio, ĉu de kulturaj institucioj.

是偶然或者是必然，我那时正好在岩波书局《读书》月刊五月号上，读到日本作家KOBAYASI Kyuzi写的一篇《中国杂谭》。文章作者两年前随一个电视组访问过中国。他说，腐败就像似不治之症在漫延。如果不给相关的人士（或是政府官员，或是共党领导，或是文化干部）贿赂，就什么事情也办不成。

Mi do supozis laŭ tiu artikolo, ke ankaŭ la eldono de “Akipelago Gulag” en ĉina traduko estis nun ebla tial, ke koncerna funkciulo aŭ koncernaj funkciuloj estis korputita aŭ koruptitaj de la eldonejo aŭ la tradukinto.

按照这篇文章的思路我猜想，《古拉格群岛》的中文本之所以能够出版，看来要么是某个干部要么是某些干部接受了出版社或者是译者的贿赂才得以实现的。

Kaj sekve ankaŭ “7000 tagoj en Siberio” en ĉina traduko de s-ro Shi Chengtai, povus eldoniĝi, se la eldonejo aŭ s-ro Shi Chengtai mem farus tion sama nun someron.....

那么，如果是出版社或者石成泰本人在这个夏天也如此这般一番，则石成泰翻译的《西伯利亚七千天》中文本岂不是也就可以……

Sed laŭ retroŝta letero, kiun mi ricevis antaŭ kelkaj tagoj, li elektis alian vojon, nome serĉi en Hongkongo helpe de tiea esperantisto eldonejon pretan eldoni tiun verkegon en lia ĉina traduko. Verŝajne li jam sukcesis en tio. Vi ja scias, ke kvankam Hongkongo nun apartenas al Ĉinio, tie oni ankoraŭ ĝuas pli da libero ol en Ĉinio propra.. Krom tio laŭ Shi Chengtaj la libro estas eldonebla malplikoste ol en Ĉinio propra, tiel ke la jam sendita al li monsumo (170,000 enoj) sufiĉos por tio.

可是按几天前收到的电子邮件，他选择了另外一条途径：请世界语者帮忙，到香港去找一家愿意出版这本书的出版社。他似乎已经成功。你们知道，尽管香港现在回归中国，但在那里人们享有比中国大陆更多的自由。此外，据石成泰说，在那里出书的成本也低于中国大陆。这样一来，已经寄给他的数目（170,000 日元）也就够用了吧。

Mi forte esperas , ke ĉi-foje la ĉina eldono de “7000 tagoj” realiĝos, kvankam ne en Ĉinio propra sed en Hongkongo.

我强烈地希望，这一次《西伯利亚七千天》中文本能够出版，即使不是在中国大陆而是在香港。

Se tiel efektive okazos, estiĝos problemo, kiel uzi la monsumon, kiun poste kolektiĝis en la Fonduso Shi Chengtai. Mi ankoraŭ ne havas la tempon konsiliĝi pri tio kun s-ro Shi Chengtai, sed mi intencas proponi al li, kompreneble post konsiliĝo kun de la kontribuintoj, ke li ĉinigu aliajn valorajn kaj aktualajn verkojn el Esperanto, kaj kiuj tiel aŭ alimaniere helpus demokratigon de Ĉinio.

Ekzemple “Maskerado ĉirkaŭ morto” de Tivadar en SOROS.

如果真的这样取得成功，就会出现另外一个问题，即如何使用石成泰基金后来募集到的款项。我还没有来得及和石成泰商量这件事。但我打算（当然是与赞助人协商之后）建议他从世界语再汉译另外一些有价值的当代著作，这样会有助于中国的民主化。例如SOROS的 Tivadar的作品《死亡周围的骗局》。

En ĝi la aŭtoro, juda advokato kaj esperantisto en Budapesto, vive priskribas, kiel li povis transvivi per sia saĝo okupacion de Nazi-Germanio kaj la militon kun sia tuta familio (la edzino kaj du filoj) kaj kun multaj gejudoj, kiujn li vivoriske helpis diversmaniere...

作者是位住在布达佩斯的犹太人世界语者，在此书中他生动地描写了他与自己的家人（妻子和两个儿子）是如何靠智慧度过了纳粹占领及战争的艰难时期，又是如何地冒着生命危险、用各种方式帮助了许许多多的犹太人……。

Mi intencas donace sendi al li ankaŭ tiun libron samkiel siatempe la libron “7000 tagoj en Siberio”.

我想把这本书赠送给石成泰，就像我当时把《西伯利亚七千天》寄送给他一样。

Mi kredas, ke li konsentos. Se tio realiĝus, la monsumo, kiu kolektiĝis kaj kolektiĝos poste por la Fonduso Shi Chengtai, estus bonege uzita.

我相信他会赞同我的想法。如果这得以实现，那么为石成泰基金募集到的那些钱，就真的用在非常得当的地方了。

Nu, mi kredas, ke mi ĝis nun menciis sufiĉe la kialojn, ke mi ankoraŭ restas esperantisto. Esperanto ja alportis al mi multe da profito, kvankam ĝi ne estas plejparte materia sed mensa.

我相信，我已经向各位讲清楚了足够的理由：我为什么我为什么始终不渝地还要当世界语者。世界语带给了我许多好处，尽管这些好处绝大部分都只是精神上而非物质上的。

Sed mi povas aldone mencii unu kazon, ke Esperanto alportis al mi ankaŭ materian profiton. Nome en 1975 aperis en mia japana traduko “La danĝera lingvo”, kiu detale priskribas, kiel Esperanto, kiel danĝera lingvo estis persekutita en ĉiuj despotaj landoj ekde Cara Rusio, tra Nazi-Germanio kaj Stalina Soveta Unio ĝis orient-eŭropaj landoj post la milito escepte de Jugoslavio, kie Esperanto ĝuis relativan liberon, kaj kiun kun verkis mia germana amiko s-ro Ulrich Lins en Esperanto, kiel volumo de la prestiĝa Nova Libro de Iwanami kaj mi ricevis por ĝi sufiĉe multe da tantiemo, ĉar la eldonkvanto estis kvindek mil ekzempleroj, kvankam la prezo estis malalta (230 enoj). Kaj mi poste aŭdis de s-ro Ulrich Lins, ke li povis per la tantiemo eĉ aĉeti aŭton!

但是我也愿意补充一个世界语给我带来物质利益的例子。也就是1975年我日译《危险的语言》这本书的故事。这本书详细地讲述了，世界语，作为一种危险的语言，在所有的集权国家，上起沙皇俄国，中经纳粹德国和斯大林的苏联，一直到战后的东欧各国，是如何遭受残酷迫害的。在东欧只有南斯拉夫是个例外，世界语在那里得到了较为自由的发展空间。这本书的世界语原著作者是我的德国朋友Ulrich Lins先生。这本书被列入有名的“岩波新书”，为此我得到了为数可观的版税。因为尽管此书价格很低，订价只

有230日元，可它的印数高达五万册。事后我听Ulrich Lins说，他用这笔版税足以购买一辆轿车哩！

Mi finas. Koran dankon, estimataj kaj karaj ge-aŭskultintoj, pro via atenta aŭskultado!

我的话完了。敬爱的各位听众，非常感谢你们认真地听了我的演讲！

Kurisu Kei sur UK-podio

(2007-08-05)

Kurisu Kei ĉiam justama,
dumviva strebad' por racio,
por Esperanto, por socio.
Legendas lia vivo drama.

Dulingva tradukisto fama,
Dojen' vivanta fosilio.
Kurisu Kei ĉiam justama,
dumviva strebad' por racio

Kiam li per parolo flama
salutas sur UK-podio,
okazas vera sensacio,
tondras al li hura' aklama!

Kusisu Kei, ĉiam justama.

— Versis Guozhu

eLibro far Guozhu 4224Kurisu